

Poste la knabinoj demandis min, ĉu ni iru ien por vespermanĝi. Tiam mi rememoris hororajn rakontojn, kujn mi legis en hungaraj gazetoj pri trompitaĵ eksterlandanoj en Budapeŝto en similaj situacioj. Laŭ tiuj artikoloj hungaraj knabinoj invitis alilandanojn al restoracioj aŭ trinkejoj, kie kelneroj pagigis nekredeble grandajn sumojn kunlaborante kun la knabinoj. La knabinoj en tiuj rakontoj ĉiam trinkis senpagan kamomilan teon, sed la kelneroj kalkulis mil dolarojn en la fakturo asertante, ke tiu flava trinkaĵo, kiun la knabinoj trinkis estis plurcentjara franca konjako, kies prezo estis nekredeble alta.

Eble mi trofantaziis la situacion kaj la knabinoj estis simple malsataj. Ĉiukaze mi diris, ke mi jam unufoje vespermanĝis kaj post la manĝo de riĉe farĉita giroso kun rostita viando mi jam ne povus manĝi plian vespermanĝon. La knabinoj komprenis tion nature kaj diris, ke ili ĵus rimarkis, kiom malfrua la tempo estis. Ili diris, ke ili devis tuj hejmeniri. Tial ni rapide adiaŭis unu la alian en la ankoraŭ iom stufe varma hanoja lagobordo.



La pordo kondukanta al la „*Ponto al la Matena Sunlumo*” ĉe la bordo de lago Hoan Kiem

ROSTITAJ HUNDOJ ĈE BAZARO EN HANOJO

Matene mi iris matenmanĝi denove al giros-rostejo kaj poste iris al alia urboparto, iom for de la lago Hoan Kiem. Ĉar pasintsemajne mi trovis, ke tie oni vendis fruktojn malpli koste, ol en la urbocentro plene kun eksterlandanoj. Nun mi sukcesis aĉeti kilogramon da banano por 10 mil dongoj, do ĉ. kvin dolaroj. Sed aliaj verdkoloraj fruktoj, forme kaj laŭ grandeco similaj al oranĝoj kostis 70 mil dongoj por kilogramo. Ĉe la apuda tablo la prezo estis 50 mil dongoj, do mi aĉetis ankaŭ tie kilogramon da tiuj. Ankaŭ dolĉaj mangoj estis bongustaj, do mi aĉetis ankaŭ tiujn kaj pagis 40 mil por tio. Tiel ĝis mia pluvojaĝo al Ĉinio mi estis provizita per vitaminoj.

Mi estis scivola pri la prezoj en Ĉinio. Mi sciis, ke post mia lasta vizito al Pekino ankaŭ tie signife ŝanĝiĝis la vivcirkonstancoj. Tiam preskaŭ ĉiuj ĉinoj estis vestitaj en kvazaŭ uniformo Mao-kompleto surstrate kaj la socio estis sufiĉe fermita de la ekstera mondo. La plej multaj homoj uzis la vorton kamarado kiam ili alparolis unu al la alia. La uzado de tiu vorto estis ĉiutaga kutimo en la komunista partio. Nuntempe la situacio ŝanĝiĝis. La vorto kamarado estas apenaŭ uzata en la ĉiutaga vivo, eĉ en la komunista sinjoro aŭ sinjorino vortoj estas uzataj. La signifo de vorto „*kamarado*” multe ŝanĝiĝis dum la lastaj jardekoj, nuntempe en la ĉina slango ĝi signifas samseksamulon.

La lando fariĝis pli malfermita al la mondo, multaj eksterlandaj investantoj aperis en Ĉinio kaj ankaŭ ĉinaj amasoj aperis en la eŭropaj grandurboj. Ankaŭ en Budapeŝto troveblas verŝajne pli da ĉinaj restoracioj ol hungaraj. Aperis nova fenomeno koncerne al tio. Multaj ĉinaj infanoj naskiĝas eksterlande kaj ensociiĝas jam en fremda kulturo. En Budapeŝto ekzemple multaj el ili vizitas hungarajn lernejojn. En la ĉina slango ankaŭ por tiu fenomeno estiĝis nova vorto „*hsiangĉiao ren*”, (*bananohomo*). Tiu vorto aludas al ĉino, kiu ensociiĝintis en fremda kulturo. Laŭ ĉinoj tiu homo estas ekstere flava kaj interne blanka, ĉar lian pensmanieron kaj konduton difinas la eŭropa kulturo.

Ĉar mi restos en Vjetnamio ankoraŭ kelkajn tagojn, mi pensis, ke mi aĉetos ankoraŭ kelkajn litrojn da trinkakvo krom la fruktoj. Laŭ la lokaj kutimoj la prezoj nenie estis skribitaj en Hanojo. Tio estas malsame en la najbara Tajlando, tie laŭ tiu vidpunkto la kondiĉoj jam estas multe pli internaciaj. En Hanojo mi ĉie devis demandadi la prezon, kiam mi vidis unu kaj duonlitrajn akvobotelojn en la vendejoj. Kiom da lokoj, tiom da prezoj. Ofte oni diris nenion, ĉar multaj povis paroli nek unu vorton en ajna fremda lingvo. Tiam ili skribis sur sian haŭton per globkrajono 15 mil dongoj, ĉ. 0.80 dolaroj. Poste ili miris, kial mi ne aĉetis eĉ unu botelon. Se ili sciis, ke hejme en superbazaro Tesco mi kutimis aĉeti similan akvon por 0.20 dolaroj, kaj eĉ en la najbara strato de Hanojo mi aĉetis por 10 mil dongoj la samon, tiam ili tute nem mirus.

Post la aĉeto de fruktoj mi promenis plu al la strato Phung Hung norden kaj kelkajn metrojn apud la fruktovendistoj mi vidis grandajn rostitajn hundojn sur tabloj. La hundoj estis ruĝkruste rostitaj kaj aspektis simile kiel ĉe ni aspektis la bruletigataj porkoj en vilaĝaj porkobuĉadoj. Tiajn rostitajn hundaĵojn mi tute ne vidis ĉirkaŭ la lago Hoan Kiem, en la plej konata turisma centro de Hanojo, sed en la Phung Hung strata bazaro multegaj estis venditaj. Apud la rostitaj hundaĵoj pli norden mi vidis multajn sepiojn, garnelokrabojn kaj reĝkrabojn en grandaj basenkestoj. Ili estis frostigitaj per grandaj glacioblokoj.

En la kongreso la koreaj partoprenantoj petis min prelegi pri miaj impresoj kaj spertoj en la centro de ŭonbulismo (Won budhismo). Tial en ilia faka konferenco mi parolis ankaŭ pri tiu temo. Mi diris, ke en januaro mi estis en meditada renkontiĝo en Korea urbo Iksan kaj poste en kelkaj interesaj ekskuroj proksime al la Flava maro. Ĉar la etoso tie estis tre amika kaj mi persone spertis, ke aplikante la meditadajn teknikojn la damaĝigaj stresoj malgrandiĝis, mi proponis al la aŭskultantoj partopreni tiun renkontiĝon. Laŭ miaj spertoj modernaj homoj eblas refortiĝi fizike-psike per ĉiutaga uzo de meditadaj metodoj. Mi menciis, ke ankaŭ mi decidis reiri al la venontjara internacia medita renkontiĝo. Post la ŭonbulisma fakkunsido la korea delegacio invitis min al komuna tagmanĝo. Tio

okazis en granda ĝardeno de eleganta restoracio apud hotelo Saigon, kie ni manĝis plurpladajn sudaziajn manĝojn. Mi volis gustumi hanojan bieron, sed mi ne sukcesis trinki ĝin, ĉar ĝi ĵus elĉerpiĝis.

La programoj de la kongreso estis tre interesaj por mi kun multaj novaĵoj, ĉar en la lastaj 15-20 jaroj mi kutime ne partoprenis tiajn kongresojn. Pasintjare mi povis ĉeesti kelkajn programojn de la UK en Kopenhago, sed la tutan kongreson mi ne partoprenis, ĉar tiu vojaĝo celis plurlandan turisman viziton. Tial mi nun travivis kun granda surprizo, ke multaj homoj venis al mi kaj volis min inviti al tagmanĝo aŭ vespermanĝo. Ili ĉiuj ekkonis min, iu diris, ke li vidis min en Belgio antaŭ multaj jaroj, aŭ ni renkontiĝis en Koreio, aŭ eble en Japanio. La vendisto de la libroservo venis al mi dirante ke sia edzo aŭskultis mian prelegon kaj diris, ke ankaŭ ŝi ŝatus aĉeti miajn librojn. Mi ne povis imagi kiel ŝi povis ekkoni min inter okcent homoj en la granda homamaso.



Rositaj hundoj kaj hundokolbasoj en la merkato

Kiam la ĉinoj eksciis, ke mi volis pluvojaĝi de Hanojo al Wuhan, ili demandis, kiel mi sukcesos vojaĝi sole en tiu grandega ekzotika lando. Laŭ ili ĉinoj ne komprenus eĉ la adreson de la hotelo, kiam mi dirus tion al la taksiŝoforo, ĉar la prononcoj de ĉinaj vortoj estas diversaj kaj malfacile kompreneblaj. Vane mi skribus la adreson per latinaj literoj sur paperon, la plej multaj ĉinoj ne kapablas legi tiutipajn tekstojn. Mi diris, ke estis neniu problemo, ĉar mi ne intencis skribi ĉinajn vortojn per latinaj literoj. Mi trovis nature, ke mi skribos ĉion per ĉinaj ideogramoj sur paperon. Ili tre miris pri tio, ke mi estis tiom memstara, ĉar ili kutime iris al la stacidomo aŭ flughaveno por akcepti la plej multajn eksterlandajn gastojn.

En Azio estas ofta kutimo akcepti eksterlandajn gastojn ĉe la stacidomo aŭ flughaveno kaj prizorgi lin akompanante dum la tuta vojaĝo ĝis la forlaso de la lando por ke alilanda gesto ne perdiĝu en fremda lando. Al mi okazis simila afero ankaŭ en Koreio kaj miaj koreaj geamikoj tute ne komprenis, ke mi trovis tion nenecesa. Kvankam ili ofertis atendi min en bushaltejo, tiu oferto iomete ĝenis min. Mi tute ne volis, ke ili perdu multajn horojn por iri al bushaltejo, poste akompani min al hotelo kaj poste revojaĝi al ilia laborejo. Tio tute ne estis necesa por mi, ĉar ekzemple en la granda korea havenurbo Busan mi povis preskaŭ pli bone orientiĝi, ol en eŭropa urbo. En tiu urbo ĉiuj metrohaltejo-nomoj estis skribitaj kvarlingve: koree, japane, ĉine kaj angle, kaj en multaj kazoj mi povis legi ĉiujn tiujn signojn en ĉiuj kvar lingvoj. Tial la situacio por mi kelkfoje estis multe pli klara, ol en Eŭropo.



La plej multaj ĉinaj partoprenantoj de la kongreso simile al mi forveturos al Nanning el Hanojo. Unu el ili volas pasigi kelkajn tagojn en tiu sudĉina urbo kaj ŝi proponis, ke de tie mi veturu plu al sia hejmurbo. Temas pri alia fama ĉina urbo proksime al Nanning kaj Wuhan. Tiu urbo estas fama pri tio, ke tie naskiĝis prezidento Mao Zedong. Mi provizore planis veturi rekte de Nanning al Wuhan, se mi ricevos lokon al trajno aŭ buso. Se tio ne sukcesus, tiam eble mi tamen iros rigardi la naskiĝurbon de prezidento Mao. Nia kunkongresano ĉiukaze jam donis al mi sian telefonnumeron por voki ŝin, se mi estos en Nanning. Ŝi diris, ke tie ŝi volonte montros al mi la vidindaĵojn de la urbo.

Aĉeti trajnbileton ĉi tie en Azio estas sufiĉe komplike. Mi legis en la reto, ke iu ne sukcesis aĉeti trajnbileton eĉ al la transsiberia ekspreso, ĉar la nemultekostaj biletoj ofte jam semajnojn pli frue elĉerpiĝas. Tiuj ĉinaj partoprenantoj diris same. Inter ili pluraj ne sukcesis aĉeti biletojn por litvagono, malgraŭ, ke ili povis paroli ĉine en la stacidomoj kaj vojaĝoficejoj kaj ili bone konis la lokajn kutimojn. Kelkaj el la eŭropaj kongresanoj provis veni ĉi tien per trajno el Eŭropo, inter ili ankaŭ mia amikino Veronika Poór. Antaŭ kelkaj tagoj ŝi sukcese doktoriĝis pri fiziko kaj kemio en brita universitato kaj poste ŝi volis veni al IJK de TEJO per tiu aventura maniero. Sed ĉar nek ŝi ricevis trajnbileton, tial ankaŭ ŝi devis veturi per aviadilo la lastan parton de sia vojaĝo.


En la kongreso en vesperoj okazis buntaj artaj prezentoj. Tiuj okazis ne en la kongresa centro, sed en multe pli granda teatra salono de la universitato. Jaŭde vespere estis eĉ du interesaj spektakloj: unu pri la vivo de Galilei kaj poste kabaredo. Ĉar la oficiala akcepto de la urbestro okazis samtempe, tial post la spektaklo pri Galilei-dramo oni devis fari duonhoran paŭzon por atendi la partoprenantojn de la akcepto kaj vidi almenaŭ la kabaredon kune kun ili.

Ankaŭ mi ricevis invitilon al tiu akcepto, sed ĉar estis skribite alveni strikte konvene al la okazo kaj nepre ne veni en sandaloj, tial mi fine decidis ne partopreni la akcepton. Ĉar mi kunportis kutimajn vestojn uzeblajn en la tropiko, inter alie malfermitan sandalon kaj mi ne volis

aĉeti nur pro la akcepto ankoraŭ unu paron da fermitaj ŝuoj, kiujn mi neniam surhavas poste.

Post pli ol duonhoru fine alvenis la partoprenintoj el la akcepto. Ĉar du lokoj apud mi estis liberaj en la teatro, la du plej ĉefaj moŝtoj, la hinda profesoro Probal Dasgupta, prezidanto de UEA kaj Brian Moon, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto sidiĝis apud min por rigardi la kabaredan spektaklon. Ili estis scivolaj pri la kabaredo, sed mi volis vidi kia estintus la konvena vestaĵo kaj ŝuo, kiujn oni devintus surhavi en tiu grava akcepto.

Jen, nek unu el ili estis en kompleto, la sinjoro prezidanto estis en tradicia hinda vesto, la vicprezidanto de la akademio en eŭropeca pantalono kaj ĉemizo sen kravato. Ambaŭ estis en sandaloj, eĉ la hinda prezidanto tre saĝe, konvene laŭ hinda kaj hindoĉina klimatoj kaj laŭ la lokaj kutimoj tute ne surhavis strumpojn sur siaj piedoj. Eĉ kiam komenciĝis la spektaklo, tiam li demetis ankaŭ la sandalojn. Kiel kutime en fora-oriento, li sidis apud mi kaj rigardis la spektaklon tute nudpiede.



DISKUTO PRI KOMUNISMO EN LUKSA HOTELO

En Eŭropo ni ne kutimas manĝi hundaĵon kaj pro tio mi pensis, ke eble mi ne devintus iri hieraŭ al la Phung Hung strata bazaro. Ĉar depost mi vidis tie la krustkrake ruĝajn rostitajn hundaĵojn, mi rigardis suspekteme ĉiujn etajn rostitajn viandopecojn, raguojn kaj muelitajn viandaĵojnen la hanojaj restoracioj. Kiam mi vidis tiaĵojn, tiam mi tuj cerbumis kaj provis diveni, el kio ili estis faritaj. Tial mi skribis retleteron al la knabinoj de la medicina universitato por iri kune vespermanĝi. Mi pensis, ke tiel ili povus ekzerci la anglan kaj mi povus peti ilin traduki la nomojn de manĝaĵoj kaj klarigi el kiu viando ili estis faritaj.

La renkonto bedaŭrinde ne sukcesis. Ili pensis, ke ni renkontiĝos antaŭ la ĉefpoŝto sed mi atendis ilin ĉe la ponto Matena Sunbrilo ĉe la lago Hoan Kiem. Se ni jam tiel malsukcesis renkontiĝi, mi devis iri vespermanĝi sola. Mi manĝis bongustan tipan vjetnaman pladon kun diversvianda garnaĵo kaj rizo kaj aldone supon el freŝaj verdaj arbofolioj. La manĝaĵo estis bongusta, sed la kuiristoj ne komprenis kial mi esploradis tiom zorge la diversajn viandopecojn per miaj 3.5-diopriaj okulvitroj.





Anonco pri la Esperanto Kongreso en la strato

La teleregilo de la klimatizilo tute difektiĝis en la pasintaj tagoj. Vidinte la malvolontan priservadon de la oficistoj de mia hotelo mi jam ne petis ilin la trian fojon por ke ili ŝanĝu la elektraĵn piloĵn. Mi sciis, ke ili tion opinius persona ĝeno. Sed mi rimarkis, ke la aparaton eblis funkciigi ankaŭ sen teleregilo. Por tio oni devis kunmeti du fotelojn en la ĉambro, stari sur ili kaj tiam atingebliis butono de la klimatizilo sub la plafono. Puŝante ĝin la aparato ekfunkciis.

Ankaŭ en tiu tago okazis ege multaj diversaj programoj en la kongreso, ofte samtempe, do estis malfacile elekti kiun partopreni. Mia prelego komenciĝis matene je la 9-a horo en la IKU (Internacia Kongresa Universitato), kies rektoro ĉijare estis profesoro Gotoo Hiroshi. Bonŝance la temo, pri kio mi parolis interesis multajn partoprenantojn. La titolo de mia prelego estis „*kiuj kontrolas la registarojn de la mondo?*”. Tial salono Lapenna, en kiu mi prelegis, bonŝance tute pleniĝis. Ĉe la fino okazis multaj demandoj kaj komentoj, multaj partoprenantoj aĉetis miajn librojn surloke, do mi trovas la prelegon sukcesa.



La temo de la prelego kaptis la atenton jam antaŭ la kongreso. Danke al tio svedaj partoprenantoj tuj en la unua tago atentigis min, ke depost mia vojaĝo al Svedio la supera ŝtata kontrola sistemo ŝanĝiĝis. Kiam mi studis tiun modelon en Stockholmo, tiam la kontrola organizo Riksrevisionsverket funkciis, kiel registara organo. Poste la prezidantino de tiu organo serioze klopodis ricevi pli grandan sendependecon kaj la parlamento decidis funkciigi la organizon sub la nacia parlamento kiel unu el la parlamentaj oficejoj.

Simile al aliaj prelegantoj mi parte laŭtlegis la tekston de mia prelego kaj parolis ankaŭ improvizite kun aldonaj komentoj kaj neskribitaj aldonoj. Tiel mi provis fari la skribitan kaj ankaŭ libroforme eldonitan tekston pli komprenebla kaj bunta. Laŭ la reagoj de la publiko mi vidis, ke la neformalaj nelegitaj aldonoj estis pli interesaj kaj sekveblaj, ol la skribitaj tekstoj, tial mi decidis ankaŭ estonte tielmaniere fari la plenajn prelegojn.

Post la fino de la prelego la partoprenantoj demandis min pri la tri uzataj kontrolaj sistemoj de la mondo. Ili volis kompreni, kiu el tiuj sistemoj estis la plej efika kaj al kiu direkto oni devis evolui. Ĉiuj komprenis, ke estis grava tasko fari pli efikajn superajn kontrolajn organizojn. Ĉefe la ĉina partoprenanto volis scii tiujn eblojn, kio estis tute komprenebla. Ĉar en Ĉinio fariĝis rapida ekonomia evoluo, se tio daŭros tiel plu, tiam post kelkaj jardekoj ĝi havos la plej fortan ekonomion da la mondo.

Mi diris en miaj respondoj, ke teorie la ŝtata kontrola organizo estas ju pli sendependa de la kontrolataj oficejoj, des pli efike ĝi povas funkcii. Evidente tio motivis la klopodojn ankaŭ de la prezidantino de la sveda Financkontrola Organizo lobiante por la funkciado de la organizo ne sub la registaro, sed sub la parlamento.

En la reala vivo la situacio estas tamen multe pli nuancita. En Skandinavio (ĉefe en Svedio) la koruptado jam tiam estis la plej malgranda, kiam la organizo funkciis sub la registaro. Dum la sama tempo la koruptado en la mediteraneaj landoj estis pli granda, malgraŭ la sendependa funkciado de la kontrola kaj aŭditorada organizo.

Post mia prelego mi rigardis kiujn aliajn programojn indus ĉeesti en la resto de la tago. La plej interesaj programoj por mi okazis en salono Haszpra en tiu tago, tial mi decidis partopreni tiujn. Tiu salono kutime funkciis kiel bala salono kaj estis en ĝi tiom malvarme en la tropika varmego, ke mi devis survesti ankoraŭ alian ĉemizon sur mian t-ĉemizon.

La unua programo estis neformala internacia diskuto pri ateismo, kie rilate al ĝi kelkaj ĉeestantoj menciis la aferojn de komunismo. Por mi ŝajnis iom strange vidi multajn homojn el la plej riĉaj landoj de la mondo (Usono, Svislando, Japanio) en luksa bala salono de kvinstela hotelo babili pri la avantaĝoj de komunismo kaj revii pri kiom bona ideo estus disvastigi tiun ideon en la mondo. En Eŭropo ni studis, ke komunismo estis ideo por malriĉaj laboristoj kaj kamparanoj.

Poste okazis internacia koncerto en tiu salono, kaj la reprezentantoj de la 2013-jara UK prezentis la islandan ĉefurbon, la kongresurbon de la ventontjara internacia renkontiĝo. Poste estis tie gaja aŭkcio de malnovaj raraj libroj, inter ili plurcentjaraj relikvioj. Ĝin gvidis amerika profesoro Humphry Tonkin kaj la rezulto estis pli ol 1300 eŭroj. En tiu sumo estis jam ankaŭ la prezo de la kongresnumero 1. de la venontjara UK. Tiun monon ricevos la Volontula Servo.

La venonta programo estis internacia arta programo kiun oni prezentis same en la universitata podio. La partopranantoj estis liveritaj denove per aŭtobusoj. Tie estis vico da artistoj de brazilaj dancistinoj, diversaj amatoraj afrikaj artaj grupoj, eŭropaj kantisoj, kaj aziaj dancgrupoj. La granda teatra halo laŭtis de daŭra aplaŭdado. La programon finis torenta finalo kun ĉiuj artistoj sur la podio. Ili kantis ĉiamverdajn kantojn kun la publiko. Post la kultura programo ni ĉiuj estis reportitaj al la kongresa centro, de kie laŭkutime mi iris piede hejmen al mia hotelo proksima al la kongresejo.

En la sepmiliona Hanojo nenie estis unuformaj rubuoj antaŭ la domoj kiel en Eŭropo, sed la rubaĵoj estas metitaj antaŭ la pordon en diversaj plastaj sakoj. Tiuj sakoj foje-foje malaperas, do iuj iam regule kolektas ilin en la urbo. Post sunsubiro, promenante hejmen de la kongresejo, mi rimarkis novan fenomenon. Kiam la trafiko malpliĝis, la strataj kokinoj ekdormis kaj aliaj etaj bestoj venis al la

stratoj el siaj kaŝejoj. Promenante hejmen mi devis ĉiam rigardi antaŭ miajn piedojn por ne surtreti ilin. Iu vigle kuranta eta lacertsimila besto tamen preskaŭ sukcesis salti sub mia piedo. Mi povis vidi kio ĝi estis nur kiam ĝi venis tre proksime al mi. Ĝi estis ne lacerto, sed grandega blato. Grandegaj ratoj zigzagas antaŭ mi sur la ŝoseo, same kiel antaŭ kelkaj monatoj en la bangkoka bazaro mi vidis, sed ĉifoje tio okazis dumtage.

Venante hejmen proksime al mia hotelo en strato Bat Dan foje sonoj de kuriozaj muzikiloj kaptis mian atenton. Venante pli proksimen mi vidis ĉirkaŭbaritan trotuaron, eĉ parton de la ŝoseo per grandegaj florkronoj kaj malantaŭ la barilo muzikistoj ludis per longaj fluto aŭ trumpetosimilaj muzikiloj ian fremdajn melodiojn. La kapoj de ĉiuj homoj tie estis volvitaj per blankaj rubandoj. Alventine proksimen mi povis legi el la surskriboj en la vjetnama lingvo, ke tie iu mortis en tiu tago. Do, okazis adiaŭceremonio de mortinto tie surstrate, same kiel ankaŭ aliaj eventoj de la vivo okazas ĉiam surstrate en la vjetnama ĉefurbo.



MATENMANĜO ĈE BAZARO PHUNG HUNG

Hodiaŭ matene mi iris rigardi ankaŭ la kongreson de TEJO (Tutmonda Esperanto Junulara Organizo) kiu okazis ĉijare ankaŭ en Hanojo. Sed tiu aranĝo okazis ne en la multege kostega hotelo Melia, sed en la sidejo de Asocio de Amikaj Societoj de Vjetnamio. Tiu konstruaĵo estis sufiĉe proksime al mia hotelo, tial mi promenis tien tra strato Phung Hung. Kvankam la musona pluvo daŭre pluvis, la ruĝe rostitaj hundoj ankaŭ nun viciĝis krom la legomoj kaj fiŝoj en la bazaro.

Nun mi povis ĉirkaŭrigardi pli bone ol dum la pasintaj tagoj, kaj nun mi vidis, ke en tiu parto de la bazaro estis venditaj nur hundaĵoj, aliaj varoj (kokinoj, porkoj, ktp.) tute ne estis videblaj. Mi rimarkis, ke en tiu hundaĵa parto de la bazaro funkciis ankaŭ restoracio en la malantaŭa parto de la hundoviando-vendejo, supozeble ankaŭ tie oni povis manĝi nur hundaĵojn.

Sed tion mi nun ne volis provi, tial mi promenis plu al la orienta flanko de strato Phung Hung. Kiam mi estis jam sufiĉe for de la hundaĵovendejo, mi trovis manĝejon kie bone videble estis tranĉitaj viandopecoj el granda porkogambo en la bolantan buljonon. Oni ne povus nomi restoracio tiujn lokojn, ĉar la tabloj kaj la etaj sidlokoj estis metitaj ne en granda salono, sed ekstere surstrate en la trotuaro. Mi kaptis la eblon matenmanĝi tie, mi prenis tre bongustan akran, pipran, ĉili-kapsikan buljonon kun multe da legomoj kaj nudeloj.

Ĉi tie en Vjetnamio estas kutime uzi kaj kuleron kaj manĝobastonetojn por manĝi la supon. La nefluidajn partojn de la supo oni prenas per la bastonetoj, la fluidan per kulero. Mi tute ne uzis kuleron, sed laŭ japana maniero mi manĝis eltrinkinte la supon el la suptelero. Ĝis nun eble tio estis la plej bongusta supo kiun mi manĝis en tiu lando kaj ĝia prezo ne estis tre alta, mi pagis nur 30 mil dongojn por ĝi.

Intertempe la pluvetanta mosuna pluvo ĉesis, kaj jam la surstrataj frizistoj instaligis sur la larĝan trotuaron de la apuda parko. La instalaĵoj estis: granda spegulo, tondilo sur eta tabulo, kombilo kaj seĝo. Ili laŭte invitis min tondigi mian hararon. En Vjetnamio tiu

laboro okazas surstrate. Sed mi nun ne volis fari tiun proceson pro tro la longa klarigo: kiom longa estu mia hararo, kiom ĝi kostas, ktp. Anstataŭ tio mi kunportis mian propran hartondilo-maŝinon kaj laŭnecese mi mem tondis mian hararon en la hotelo.

Ĉar ni jam estis sufiĉe malproksime de la lago Hoan Kiem, la centro de la vjetnama ĉefurbo, pro tio ankaŭ la prezoj ŝanĝiĝis. En la pasintaj tagoj plurfoje okazis, ke mi manĝis eŭropajn manĝojn, ekzemple bulkon kun butero. En la avidilo estis donita multe da butero al mi, kion mi ne kapablis manĝi dum mia vojaĝo. Mi ne forĵetis ilin kiel la plej multaj pasaĝeroj, sed kunportis ilin al Hanojo kaj metis ilin en la fridujon de mia ĉambro. Mia generacio ankoraŭ ne alkutimiĝis superflue forĵeti eĉ ne tuŝitajn multekostajn manĝojn, dum ni scias, ke en aliaj mondopartoj multaj malsatas kaj eĉ malsatmortas.



Kiam do mi volis aĉeti bulkon kun butero mi aĉetis grandan bulkon ĉe la proksima bulkovendejo, por kiu mi kutime pagis 5000 dongojn. Tio estis 20 dolarcendoj, sed la bulko estis 2-3-oble pli granda, ol kutime en Eŭropo. Ĉi tie for de la turisma centro mi vidis ĉe

stratangulo stakon da bulkoj surplanke en korbo. Ankaŭ ĉi tie mi donis 5 mil dongojn al la vendisto, sed li donis du pecojn da bulkoj al mi en tiu loko. La akvomelono tamen ankaŭ ĉi tie kostis ege multe, la prezo estis 30 mil dongoj po kilogramo. En la najbara Tajlando ĝi kostis nur kvarone. Ankaŭ botelo da akvo kostis ĉi tie pli ol en la urbocentro, la prezo estis 15 mil dongoj por 1.5-litroj.

La prezoj nek ĉi tie estis skribitaj kaj sen kono de fremda lingvo la vendistoj skribis la prezojn sur sian haŭton per globkrajono, aŭ prenis diverskolorajn monbiletojn el la kaso kaj montradis tiujn per kiuj oni devis pagi. Estis nekompreneble por mi kial al neniu venis la ideo en la kapon skribi la prezojn sur paperon en tiu lando. Se Vjetnamio vere volas esti malferma al la mondo kaj volas kreskigi la internacian turismon, tiukaze eble devus komenci la preparojn per tiu paŝo. Por tio estus bezonata ne granda investo, nur ŝanĝo de pensmaniero.

Inter la programoj de la kongreso menciindas du hungar-rilataj informoj. En la Belarta Konkurso de UEA en 2012 Pásztor Adrienn ricevis premion „Honora mencio” en katagorio eseo pro verko „*Ombro en lumo*”. Kaj la alia: En la kunsido de UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) estis laŭtleĝite la salutletero de ĝia honora prezidanto, d-ro Ferenczy Imre. En tiu fakkunsido la prezidanto informis la partoprenantojn pri la eventoj de la Internacia Medicina Esperanto Kongreso okazinta en la ĉehia urbo Opava.

Ankaŭ Jurista Esperanto Asocio havis konferencon kies ĉeftemo estis historio de advokata praktiko en Angolo ekde la portugaliaj koloniaj tempoj ĝis hodiaŭ. Eblis spekti ankaŭ specialan vjetnaman arton en la antaŭlasta tago de la kongreso: akva pupteatro Thang Long amuzigis la publikon per esperantligva programo.

La oficiala fermo okazis sabate kaj ĝi estis aranĝita denove en la universitata granda salono pro la granda nombro de partoprenantoj. En la ferma parolo la prezidanto de la internacia organizo, la hinda profesoro Probal Dasgupta paraleligis la noblajn strategiajn celojn de la esperanto-movado kaj la ideojn de hinda poeto Rabindranath Tagore. Tagore (pr. Tagor) – vizitinte la hungaran urbeton Balatonfüred plantis arbon en la memorparko de Nobel-premiitoj – havis la

samajn noblajn ideojn kiel la kreinto de lingvo esperanto, la pola okulkuracisto Ludoviko Lazaro Zamenhof. Sur la vojo en la realigo de tiuj ideoj estis signifa mejloŝtono la ĉijara kongreso de la 125-jara esperanto-movado. Ties pli ol okcent partoprenantoj uzante komunan lingvon manifestis, ke la celo de disvastigo de komuna lingvo estas paco kaj amikeco inter la popoloj kaj la antaŭenigo de reciproka interkompreniĝo kaj tiusence konstruo de pontoj inter la popoloj kaj popolgrupoj. La partoprenantoj de la kongreso akceptis la rezolucion per ritma aplaŭdo kaj la grandskala festa evento estis fermita per la transdono de la kongresa flago.

Post la fino de la kongreso ankaŭ la vojaĝagentejoj metis siajn informilojn sur la tablojn, ili nun organizis rezervon de taksioj por tiuj, kiuj volis tielmaniere foriri el la hotelo. Grupo de ĉinaj partoprenantoj pensadis ĉu indis lui apartan buson por ne atendi la laŭhorarajn busojn, sed ili povu ekveturi al Nanning tuj post la ferma parolo.

Estis pluraj homoj, kiuj speciale nur por tiu kongreso vojaĝis ĉi tien el foraj landoj. Ili tuj post la alveno iris per klimatizita taksio al ilia klimatizita kvinstela hotelo kaj vivis tie dum la sep tagoj de la kongreso. Ili moviĝis nur inter la hotelĉambro kaj la kongresaj salonoj kaj manĝis la tutmonde unuformajn enuajn hotelajn manĝaĵojn (ovaĵo aŭ boligita ovo, bulko kun butero, ŝinko aŭ marmelado, muslio kun lakto, matene kun kafo kaj fruktosuko, bifsteko kun frititaj terpomoj por tagmanĝo aŭ vespermanĝo, ktp.) Ili pagis 2000 dolarojn kaj vidis neniom da vera vjetnama vivo.

Laŭ mi vidi la lokajn ĉiutagaĵojn eblas nur se la vizitanto vivas simile al la lokaj homoj. Dum mia vojaĝo en Vjetnamio mi vivis, kiel hanojanoj vivis. Mi trinkis kaj manĝis, kion ili trinkis kaj manĝis. Mi vivis inter ili kaj vojaĝis en busoj kaj per bicikloj, same kiel la sep milionoj da vjetnamaj homoj en la stratoj de Hanojo vojaĝadis de frumateno ĝis malfrua vespero. Mi babiladis kun ili en manĝejoj, bazaroj, stratoj aŭ sub la ombroj de parko apud lago Hoan Kiem.

Tial mi pensas, ke la legantoj de tiu ĉi mallonga vojaĝimpreso ricevas pli realan bildon kaj pli bonan ekvidon en la ĉiutagan vivon

de sudorient-aziaj homoj, ol la kongresanoj, kiuj por 2000 dolaroj aŭ eĉ pli venis ĉi tien kaj partoprenis la kongreson for de la loka komunumo. Estas tiel eĉ se ili pagis aliajn 2000 dolarojn por partopreni multekostegaj postkongresajn ekskursojn, kie ili povis aŭskulti la stereotipajn tekstojn de ĉiĉeronoj pri la politika, ekonomia kaj kultura situacio de la vizitata lando.



Skulptaĵo de vjetnama nacia heroo reĝo ĉe lago Hoan Kiem

EN LA URBO DE SUDA TRANKVILO

Alvenis la lasta tago de mia vjetnama vizito. Ĝis nun mi praktike ĉion povis pagi el mia kunportita poŝmono kaj tial oni povus diri, ke tiu ĉi vojaĝo estis praktike senpaga. La afero ŝajnis esti tiel, sed mi scias, ke en Ĉinio povus esti ankoraŭ surprizoj. La grandajn sumojn mi intencis pagi per bankkarto, sed fine mi povis uzi ilin nenie. Ĉar ili ne estis akceptitaj en la vojaĝoficejo, kie mi aĉetis bileton al Ĉinio nek en la hotelo mi povis uzi ĝin. Tie la oficistoj volis aldoni pliajn kostojn se mi uzintus mian bankkarton. Tial mi prefere pagis la hotelkoston per dolaroj.

Mi ne finkalkulis ĉiujn elspezojn kaj enspezojn, sed mi havis la senton, ke la lastan tagon en Hanojo mi havis eble pli da mono, ol mi havis ĉe mia ekiro el Budapeŝto. Tio estis pro la fakto, ke mi vivis en Hanojo modeste, kiel la vjetnamoj. Mi iris tagmanĝi kaj vespermanĝi al nekostaj restoracioj, kiel vjetnamoj, mi luis hotelĉambbron simplan, tamen komfortan, klimatizitan, ekipitan per fridujo, varmakva banĉambro kaj mi sukcesis akiri malmultekostan busbileton pluveturi al Ĉinio. Krom tio mi ricevis honorarion 250 eŭrojn pro mia prelego de la kongresa universitato kaj venis ankaŭ signifa mono vendante miajn librojn.



La hanoja bushaltejo al Nanning

La buso ekis je la 9.30 matene, per kiu mi volis veturi plu al la sud-ĉina urbo Nanning. Ĉar tiu buso ekis ne de iu centra busstacio, sen startejo aŭ bustrakoj, kie eble estus skribita la horaro, tial mi iom timis, kiel mi trovos a buson al Nanning. Sur la bileto estis nur skribite, ke la buso startos de strato Tran Quang Khai n-ro 206. Ĉe tiu domo estis neniu signo pri aludo al busstacio. En tiu domo funkciis radpneŭmatikisto kaj du vojaĝoficejoj vendantaj flugbiletojn.

Antaŭ ekveturo mi ŝatintus havi varman matenmanĝon, ekzemple bone spicitan akran buljonon, sed estis neniu loko en la proksimo, kie oni povis matenmanĝi. Mi esperis, ke sur la buso sur tabulo estos skribita vjetname aŭ ĉine kien iros la buso. La vorton Nanning mi povis legi kaj vjetname kaj ĉine. La nomo de la urbo vjetname estas Nam Ninh, ĉine 南宁. Inter ili la unua ideogramo signifas "suda" kaj la dua "trankvilo". La signifo de la urbonomo estas "*Urbo de Suda Trankvilo*". La buson ironitan tien mi rekonintus, se la nomo de celhaltejo estintus skribite sur la buso. Sed okazis, ke sur la busoj estis skribite nenio, nek vjetname, nek ĉine. Mi provis nur laŭ supozo aliri al iu buso haltanta antaŭ la koncerna domo por demandi, ĉu la buso iros al Nanning. Mi havis bonŝancon, ĉar ĝuste tiu buso preparis iri al Nanning.



Belaj montetoj apud la nanninga vojo

Ni eniris la grandan buson nur okope, do estis abunda elektoeblo sur kiu sidloko ni sidu. Ne bezonatas mencii, ke nur mi estis la sola eŭropa pasaĝero. Oni povis elekti sidlokon laŭ deziro: ĉu ĉe fenestro, aŭ en la mezo, sed ankaŭ laŭ aliaj vidpunktoj. Ĉar estis sidloko ankaŭ kun dorsoapogilo, kvankam ĝia sidilo estis elŝirita. Pro tio la tie sidanto ĉe ĉiu bremsado glitis antaŭen, ĉe ekmoviĝo malantaŭen. Ĉe aliaj sidlokoj la piedtenilo estis elrompita, ĉe aliaj la sekurzono estis ŝirita. Pro tio oni devis pensadi, ĉu bone funkcia dorsoapogilo, piedtenilo aŭ sekurzono estus pli grava kaj laŭ tio oni povis elekti la uzendan sidlokon.

Mi sidis unue sur sidlokon kun elŝirita sidilo kaj sen sekurzono. Sed ĉar la uzon de sekurzono mi pensis bezonata pli ol rigardi la pejzaĝon, tial mi decidis sidi sur mezan lokon. La sekurzono estis tre facile alĝustigi al la pasaĝero. Ĉar mankis ajna aŭtomata longecoĝustigilo, tial la grandaj homoj ĉirkaŭvolvis per ĝi la brakapogilon 3-4 oble, la malpli grandaj 4-5-oble. Tiel la vojaĝantoj mallongigis la zonon por ke ili povu ligi ilin al la sidloko agrable.

Forlasinte Hanojon la vojo kondukis tra belaj bananoĝardenoj kaj terasformaj rizkampoj nordorienten. La trafiko tie estis preskaŭ tiom kaosa kiom en grandurbo, do inter la aŭtoj zigzaxis rikiŝoj, tricikloj kaj mopedoj, kelkfoje kontraŭ la trafiko. Sed tamen ni povis daŭre progresi antaŭen. Post tri horoj la buso subite haltis. Tie oni povis iri al necesejo, aĉeti freŝajn kokosnuksojn, manĝeton kaj eĉ varmajn manĝaĵojn. Sed tiujn lastajn mi nek ĉi tie kuraĝis provi. Ĉar neniu diris kiom longe haltos la buso en tiu loko, mi ne volis manĝi en la bushalteja restoracio. Alia problemo estis, ke la ostoj de la rostitaj ripoj ŝajnis esti tro maldikaj kaj mi timis ricevi rostitan hundajon sur mian teleron. Estis ankaŭ porkoviandaĵo, sed laŭ vjetnama kutimo tiom grasa, ke estis en ĝi pli da lardo ol viando. Tial mi prefere ronĝetis nur kokosajn-buteraĵajn keksojn en la buso, kiujn mi aĉetis en Hanojo kaj manĝis nenian varman manĝaĵon en la restoracio.

Veturante plu al la nordo pli kaj pli proksime al la ĉina landlimo videblis ĉirkaŭ ni negrimpeble akutaj rokaj montoj ambaŭflanke de la vojo. Ĉe la ĉina landlimo ni falis subite en netravedblan situacion.

Ni estis elbusigitaj kaj diversaj homoj alkuris al ni. Ili montradis diversajn monerojn kaj kolorajn edikedojn, kiujn mi vidis ĉirkaŭ la koloj de multaj vojaĝantoj. Venis al ni ankaŭ eta malfermita, malrapide iranta veturilo kaj la ŝoforoj montradis ke ni sidiĝu en ĝin kaj ni metu tien ankaŭ niajn valizojn. Nia ĝisnuna kondukto donis ankaŭ ian etan monon al la ŝoforo de la eta veturilo, mi pensis unue, ke li volis ŝanĝi monon. La situacio por mi estis provizore neklara, mi esperis, ke iom-post-iom klariĝos, kio okazos. Kiel en mia infanaĝo maljunuloj diris en la hungaraj ebenaĵaj vilaĝoj: *"Ĉiam estos iel. Ĉar neniam okazis, ke estis neniel."*

Mi ne volis akcepti la koloran etiketon, ĉar mi jam havis hejme multajn similajn memoraĵojn, kiujn mi kolektis en diversaj landoj de la mondo. Sed kiam mi vidis, ke ĉiuj vojaĝantoj havis ĝin en la kolo, ankaŭ mi metis unu tien. Sur tio estis pentrite ludkarto: keroa damo. Intertempe mi vidis, ke la homoj, kiuj montradis diverskolorajn monbiletojn estis vere monŝanĝistoj, ĉar pluraj ŝanĝis iliajn vjetnamajn dongojn al ĉinaj juanoj. Kiam mi en la vico povintus ŝanĝi mian restintan monon, tiam mia eta veturilo ekiris kaj mi postkuris ĝin por eviti, ke ĝi forportu mian valizon al nekonata loko.



Veturilo ĉe la vjetnama-ĉina landlimo

Poste klariĝis, ke estis superflue urĝi. La eta veturilo portis la pasaĝerojn kaj niajn valizojn nur ĝis la ventonta konstruaĵo. Pli ĝuste nur valizojn kaj homojn, kiuj emis ensidiĝi, ĉar multaj nur piede iris tiun distancon. (Kaj poste la plian ĉ. 1-kilometran vojon, kion poste ili devis fari por trapasi la landlimon.) Irante en la unuan domon videblis, ke tie okazis la vjetnama landlimkontrolo. Post la trarigardo de mia pasporto mi ĉirkaŭrigardadis en la konstruaĵo. Mi vidis, ke en la venonta ĉambro monŝanĝaj kurzoj estis skribitaj sur tabulo per grandaj ciferoj. Mi pensis, ke tiu oficejo estis banko, kie mi povus rapide reŝanĝi miajn restintajn dongojn. Sed la oficistoj nur vigle kapneis montrante, ke ili tute ne emis reŝanĝi dongojn.



Poste ni denove eksidis en la etan malfermitan veturilon, kiu post pliaj pasportaj kontroloj portis nin al la ĉina flanko de la landlimo. Tie ni denove eniris iun domon, kie komenciĝis la ĉinaj limkontroloj. Estis tie sanitara kontrolejo, enmigra oficejo, sekureca kaj dogankontrolo. La uniformaj oficistoj rigardis ĉion zorgeme kaj tiun laboron ili faris treege ĝentile. Tie mi vidis la unuan fojon en mia vivo oficiston pri enmigrado, kiu antaŭ komenco de la kontrolo de pasporto staris rekte kaj salutis parade la vojaĝantojn. Laŭ miaj spertoj en Eŭropo nur la estro de salutacmentaj soldatoj salutis tiel parade dum naciaj festoj antaŭ la Parlamentejo.

Post la parada saluto ili traesploris miajn valizojn tre akurate eĉ dufoje kaj videble ili estis scivolaj pri du aferoj. La unua estis blanka pulvoro kunportita en enorma kvanto, kaj la alia estis miaj japanlingvaj libroj. Pri la pulvoro ili povis diveni baldaŭ ke ĝi estis talkopudro. Vojaĝante en varmaj landoj mi ĉiam kunportas talkopudron, ĉar verŝajne ĝi estas la plej evidenta preventilo en la tropikoj kontraŭ ŝvitado kaj ties sekvo, la haŭtmalsanoj. Poste ili longe foliumis mian japanlingvan libron, sed videble ne bone komprenis la enhavon. Tiam mi ekmemoris, ke unu el miaj prelegoj troveblis ankaŭ en la ĉina lingvo en la libro. Tial mi montris al ili la ĉinan tekston, kaj legante la prelegon ili tuj finis la kontrolon kaj ĝentile remetis ĉion en la valizon.

La landlimaj konroloj estis sufiĉe longaj kaj sufiĉe bone organizitaj. Tamen estis situacio, kiu superflue kaj sennecese malfaciligis la sufiĉe komplikajn proceson. La kaŭzo estis, ke la kontrolo okazis en la unua etaĝo, aŭ almenaŭ en alta teretaĝo, kien la vojaĝantoj povis porti iliajn valizojn nur per granda pena laboro sur eksteraj ŝtuparoj. Kaj eĉ la musona pluvo intertempe ekpluvis dum la kontrolo kaj pro tio la ŝtuparo estiĝis glita kaj danĝera por maljunuloj por promeni sur ĝi en la musona pluvo. Por mi, maljunulo tiu parto de la proceso estis fizike peniga. Post tiuj travivaĵoj la eta buso portis nin plu al alia zono. Tie multaj grandaj busoj atendis nin kun ĉina ciferplato por porti la pasaĝerojn al ĉiu direkto de Ĉinio. Tie mi ekkomprenis la signifon de la koloraj kartoj, kiujn la vojaĝantoj kunportis ĉirkaŭ la kolo. La busoj estis indikitaj per samaj kartoj, tial ĉiu facile povis trovi sian buson eĉ se ne povis legi la ĉinajn signojn.

Ankaŭ tie aperis monŝanĝistoj kaj lastaŝance ankaŭ mi volis liberiĝi de miaj restintaj dongoj. Mi demandis kiom da dongoj mi devus doni por unu juano. Ili montris per eta komputilo, ke la kurzo estis 4500. Aŭdante la sumon mi nur mansvingis rezigne kaj forlasis la kompanion. Sed ili kuris post mi kaj demandis, kiom mi volus pagi por unu juano. Kiam ili vidis, ke mi jam ne plu emis ŝanĝi entute, tiam venis alia homo proponante unu juanon por 3500 dongoj. Tiu kurzo estis jam pli normala, do mi ŝanĝis ĉe li miajn superflujajn dongojn.

La ŝildoj de la atendantaj busoj en la ĉina flanko jam montris, al kiu direkto ili veturos. Mia buso laŭ la ŝildo liveris la pasaĝerojn de Haiphong al Nanning. En la ĉina parto de la vojo ni veturis jam sur eŭropaj-nivelaj aŭtovojoj norden al Nanning. Alveninte la urbon ni falis en neimageble grandan trafikŝtopiĝon. La kaŭzo estis, ke malkiel en Hanojo, kie oni veturis plejparte nur motorcikle, ĉi tie en Ĉinio estis ankaŭ multegaj aŭtoj sur la stratoj. La urbo plenis de novkonstruitaj nuboskrapantaj grandaj konstruaĵoj kaj plurtrakaj larĝaj aŭtovojoj. Malkiel en Hanojo, ĉi tie neniam okazis, ke iu veturis kontraŭ la trafiko, la motorciklantoj eĉ ne miksiĝis kun la aŭtoj. Por ili aparta trako estis asignita, kiel kutime en Eŭropo por biciklantoj.



Vidante la grandajn novajn konstruaĵojn, la multegajn aŭtomobilojn kaj la bone vestitajn ĉinojn promenante en la stratoj tuj evidentiĝis, ke danke al la rapida ekonomia evoluo, Ĉinio signife riĉiĝis dum la lastaj jardekoj. Multaj grandegaj turgruoj montris, ke ankaŭ urbo Nanning rapide evoluis. Pro multaj trafikŝtopiĝoj la vojaĝo tra la urbo kaj alveno al la busa stacidomo daŭris pli ol unu horon. Tie mi tuj volis kapti taksion por iri al la hotelo. Sed la taksioj ne laŭ la Hanoja aŭ Eŭropa kutimo funkciis. Mi tute ne povis haltigi ilin surstrate de la trotuaro, ĉar inter la trotuaro kaj la aŭtotrako estis trako por motorciklistoj. Pro tio la aŭtoj kaj inter ili ankaŭ la taksioj rajtis veturi nur en la mezaj trakoj de la ŝoseo. Tial mi ne sciis, ĉu mi devus salti al la aŭtotrako, aŭ kion mi faru? Tial mi preferis reiri al la busstacio por demandi, ĉar tie mi vidis skribite angle pri turista informa oficejo.

Mi do reiris, kaj demandis ne nur la lokan taksioserĉadan metodon, sed pli grave mi volis scii, ĉu eblis aĉeti tie busbileton por pluvojaĝi al Wuhan. Miaj ĉinaj konatoj en Hanojo diris, ke tiuj biletoj rapide elĉerpiĝas, do indas tiujn akiri kiel eble plej frue. Ili diris al mi, ke la normala prezo de busbileto kostis ĉirkaŭ 160 juanojn. Antaŭ ol demandi tion, mi skribis ankaŭ ĉine sur paperon per ĉinaj ideogramoj la urbonomojn Nanning, poste sagon kaj fine la urbonomon de Wuhan. Post tiu mi skribis ankaŭ la tempon, la 11-an de aŭgusto, indikante kiam mi ŝatus alveni al Wuhan.

La virino rigardis la paperon, sed videble ŝi komprenis nenion el tio. Ĉar sur la papero ĉio estis skribita ĉine kaj estis nur unu angla vorto "August" (aŭgusto) en la teksto, tial ankaŭ la daton mi skribis ĉine. Tio estis tre simpla por mi, ĉar kiam mi estis studento en japanio, tiam mi uzis tiujn ideogramojn ĉiutage. Mi rememoris, ke kaj ĉine kaj japane aŭgusto nomiĝis la 8-a monato, do mi devis skribi ciferon 8 kaj poste desegni la simbolon de la luno, kiu signifis monaton. Poste mi devis skribi ankaŭ la tagon jene: post cifero 11 mi skribis la simbolon de la suno. La virino jam komencis kompreneti, pri kio temis. Ŝi prenis telefonon kaj komencis paroli kun iu pri la afero. Mi pensis, ke ŝi demandis la oficejon pri lokrezervo, ĉu estus libera loko en tiu buso.

Sed klariĝis, ke okazis miskompreno. Ŝi vokis angleparolantan oficiston en la turisma informcentro, ke mi diru al tiu homo per telefono precize, pri kio temis. Ankaŭ tiu oficistino malbone parolis angle kaj pro tio mi diris, ke ŝajne estus tro komplike paroli pri tiu temo per telefono. Mi proponis, ke prefere ni rezignu pri ĉio. Mi petis, ke ŝi nur diru al mi, kiel mi kaptu taksion en tiu ĉi urbo, kie praktike la piedirantoj estas izolitaj de la aŭtotrako en la plurtrakaj vojoj. Ŝajne ankaŭ tiu demando estis tro komplika por ŝi, ĉar ŝi poste denove komencis longan telefonan parolon, kion mi post iom da tempo sufiĉigis kaj eliris el la oficejo por mem serĉi taksion.

Promenante surstrate kaj cerbumante kion mi faru, haltis apud mi motorciklanto kaj montradis, ke li portos min al la hotelo. Mi demandis la prezon. Li montris 8 juanojn, ĉ. 1.30 dolarojn. Mi akceptis tion, sursidis kaj post dek minutoj ni jam estis antaŭ la hotelo. Post pago al la motorcikla taksiisto mi iris al la akceptejo, sed estis tie neniu. Surstrate sidadis ĉino, kiu venis al mi, rigardis al mia papero, kie la nomo kaj la adreso de la hotelo estis skribite ĉine kaj kapneis. Kaj mi demandis, kie do estis tiu hotelo. Li montris maldekstren al la enirejo de lumplena granda vendocentro. Ankaŭ tie mi volis montri mian ĉinlingvan paperon, sed tiam juna viro kuris al mi kun papero en la mano, dirante ke mi estis atendata tie jam delonge. Li petis, ke mi eniru tien, kie mi estis unue.



La miskompreno klariĝis poste. En tiu konstruaĵo estis plurcent modernaj apartamentoj, vendocentroj kaj tiel plu. Multaj homoj kaj organizoj aĉetis aŭ luis tie apartamentojn por funkciigi ilin kiel oficejojn, hotelojn, ktp. Do, krom tiu entrepreno ankaŭ pluraj aliaj entreprenoj funkciigis hotelojn per alia nomo en tiu grandega konstruaĵego. Ĉe la akceptejo estis skribite, ke la plej malmultekosta ĉambro kostis 50 juanoj kaj la plej multekosta 150. Al mi oni konfirmis 98 juanojn, kiam mi rezervis mian ĉambrojn per interreto. Kiam mi rigardis la tabulon de la malmultekosta ĉambro, mi komprenis, kial ĝi kostis nur 50-juanojn. Fakte, ĝi estis luebla nur por unu horo.

Meze de la domkomplekso funkciis luksaspekta puca vendejo "Taiwan City" kun klimatizitaj salonoj kaj elegante vestitaj stabanoj deĵoris ĉe la akceptejo. Sed la hotela parto de la konstruaĵo, pli ĝuste la koridoroj estis en kaduka stato. Parto de la muroj estis pentraĉita, la kontaktingoj estis lozaj, ktp. Ĉar la hotelistoj aĉetis nur la ĉambrojn, la koridoroj ne havis mastron. Ŝajne ankaŭ en Ĉinio veras la proverbo "*Al ĉevalo komuna la dorso estas frotvunda.*"

La hotelĉambroj interne estis tre komfortaj, mia ĉambro troveblis en la oka etaĝo de tiu almenaŭ 15-etaĝa domo. La konstruaĵo estis grandega marmorkovrita domo, en la ĉambro troveblis granda ĝemela lito, televido, modernaj mebloj, senpaga kabla interreto kaj klimatizilo. Ankaŭ eta kuirejo apartenis al la ĉambro kune kun necesejo, banĉambro kun duŝo kaj lavmaŝino. Krome, ankaŭ larĝa granda balkono ligiĝis al la ĉambro, de kie oni povis miri la panoramon de la urbocentraĵo ĉielskrapantaj konstruaĵoj de Nanning dum la tuta tago.

La manaĝerino de la hotelo bone parolis angle kaj ŝi estis tre ĝentila malkiel la hanojaj hoteloficistoj. Ŝi demandis, ĉu ŝi povus ion helpi. Mi diris, ke mi morgaŭ ŝatus aĉeti bileton al Wuhan kaj ŝi helpeme proponis akompani min al la busstacio aĉeti la bileton. Krom tio mi demandis, ĉu oni manĝis hundon en Nanning. La manaĝerino konsterniĝis je tio. Tial mi aldonis, ke mi ĵus venis el Vjetnamio kaj tie en Hanojo mi vidis multegajn rostitajn hundojn en la bazaro. La

virino el tiu frazo komprenis ĉion, escepte la vorton "Ha Noi". Por komprenigi ĝin mi devis skribi al ŝi sur paperon la du ĉinajn ideogramojn de Hanojo. Evidentiĝis, ke mia prononco estis malkorekta, la nomo de la vjetnama ĉefurbo estas prononcite ĉine proksimume "Ho Ne". Post kiam tio klariĝis, ni ambaŭ bone ridis kaj ŝi diris, ke mi restu certa, en Nanning mi ricevos nenie rostitan hundajon.

Ĉe la ĉambrookupo la virino petis, ke mi pagu 300 juanon. Tion mi ne komprenis, ĉar por du tagoj la prezo de la ĉambro estus nur 195 juanoj. Sed poste mi eksciis, ke ĉi tie oni kutime aldonis kaŭcion al la prezo por kazo, se gasto farus damaĝon en la ĉambro. Post tio mi iris trankvile manĝi ion varman en proksima restoracio. Ĉ. ducent metrojn de la hotelo mi trovis restoracion, kie mi mendis korean kokinaĵon kun rizo, kiu kostis 33 juanojn. La kareo estis tre bongusta, ĝi havis tute alian guston, ol mi gustumis en japanaj aŭ hindaj restoracioj. Dum mi vespermanĝis, varmeta musona pluvo komenciĝis. Tiel kvankam mi estis nur kvin minutojn de la hotelo, mi alvenis ĝishaŭte malseke en mian ĉambron fine de la unua tago en la urbo de Suda Trankvilo.



MIAJ NEĈIUTAGAJ PROBLEMOJ EN NANNING

Mi konatiĝis kun Wang Qingsu (pr. Ŭan Ĉinsu) en Hanojo. Ankaŭ ŝi partoprenis la lingvistan kongreson kun multaj aliaj ĉinoj. Antaŭ emeritiĝo ŝi estis instruistino en mezĉina urbo instruante fizikon al mezlernejoj. Ŝi loĝis en urbo Xiangtan (pr. Siang Than), en provinco Hunan. Tiu loko estis fama pri iamaj altrangaj ŝtataj funkciuloj: Mao Zedong (pr. Mao Ce Tung), Liu Shaoqi (pr. Liu Ŝao Ĉi) kaj Peng Dehuai (pr. Pen Do Huai), la prezidanto de la Ĉina Komunista Partio, la ŝtatprezidento kaj la ĉefestro de la armeo.

Ĉar ŝia filino nuntempe loĝis en Nanning, tial survoje de Hanojo ŝi interrompis la veturon por pasigi kelkajn tagojn ĉe la familio de sia filino en tiu sudĉina urbo. Sed ŝi jam ekiris al Nanning tri tagojn pli frue, ol mi. Ni priparolis en Hanojo, ke ŝi montros al mi la vidindaĵojn de la urbo, kiam ankaŭ mi estos en Ĉinio. Ni havis tempon, ĉar el Nanning ni pluveturos la saman tagon. Mi iros plu al Wuhan kaj ŝi al Xiangtan. Tiel ni havos abundan tempon promeni en la rapide evoluanta-konstruanta moderna ĉina grandurbo.



Kiel mi eksciis la unuan matenon post mia alveno al Nanning, antaŭ tago ŝi atendis min dum pli ol unu horo antaŭ mia hotelo. Sed ĉar mia buso el Hanojo malfruis du horojn, pro tio ŝi malesperis atendi plu kaj tiel ni malsukcesis renkontiĝi. Ni priparolis telefone renkontiĝi la venontan tagon matene je la 11.30 ĉe mia hotelo por iri kune tagmanĝi. Vere, ĝuste laŭminute je la dekunua kaj duono ŝi aperis ĉe mia pordo kaj ĉar bele brilis la suno kaj ne pluvis, ni ekiris tuj en la urbon. Mi proponis antaŭ tagmanĝo aranĝi du aferojn: ŝanĝi iom da mono en banko kaj aĉeti bileton por pluvojaĝi al Wuhan.

Estis surprize por mi malfacile trovi bankon okupiĝantan pri monŝanĝo. En plej multaj bankoj eblis ricevi monon nur el la aŭtomatoj kaj mi supozis ke bankkarto eldonitaj en Eŭropo ne estis akceptataj de tiuj aŭtomatoj. Kiam fine oni diris en banko, ke ili ŝanĝis eŭrojn kaj dolarojn al juanoj, Wang Qingsu demandis: kiom da juanoj mi volis ŝanĝi. Mi kalkulis, ke estus bone pagi la pli ol mil kilometrajn vojaĝkostojn ĝis Wuhan inkluzive trajnan litkupeon kaj manĝokostojn, fruktojn kaj la bezonatajn sumojn por la venontaj dek tagoj, inkluzive taksiojkostojn en Nanning kaj en Wuhan de la hoteloj al la flughaveno.

Antaŭ ekveturo mi intence ne ŝanĝis dolarojn kaj eŭrojn al juanoj por tiu vojaĝo, ĉar mi planis pagi ĉiujn pli grandajn sumojn per mia bankkarto, kiel kutime en Eŭropo. Verdire mi kunportis nur kelkajn dek- kaj dudekdolarajn monbiletojn, kiel poŝmonon, ili restis en mia poŝo dum miaj pasintaj vojaĝoj. Mi kalkulis, ke se mi ŝanĝus ĉiujn poŝmonojn, tiam mi ricevus ĉ. 1300 juanojn. Mi demandis do Wang Qingsu konante la lokajn prezojn, ĉu laŭ ŝi ĝi estus multe aŭ malmulte. Ŝi diris mallonge, ke ĝi estus sufiĉe malmulte. Ŝi parolis kun la bankoficisto por kalkuli iom pli favorpreze por mi, ol la lista kurzo. Kaj vere, mi ricevis iom da juanoj pli, ol kio estis anoncita sur la listo de la banko.

Post tio mi bezonis aĉeti trajnbileton aŭ busbileton al Wuhan. Wang Qingsu diris, ke la busstacio por iri al aliaj provincoj estis malproksime, sed la trajnstacidomo estis proksime, nur 15-minuta promeno piede. Do ni iris unue tien. Dumvoje mi miris kiom multe

ŝanĝiĝis la aspekto de la strato kompare al mia antaŭa vojaĝo en Ĉinio. Tiam mi vidis surstrate tre multajn homojn vestitajn en Mao-uniformon kaj nun male, mi vidis eĉ nek unu. Mi rimarkis, ke krom mi tute ne estis alia eksterlandano en la stratoj, kie ni promenis. Certe estis krom mi ankaŭ aliaj eksterlandanoj en tiu multmiliono granda urbo, sed la fakto, ke ni vidis eĉ nek unu, montras, ke ili verŝajne estis nur malmultaj.

La viroj estis en elegantaj someraj vestoj, kelkaj en kompleto, la virinoj en kostumo, minijupo kaj ĝinzo. Same kiel en multaj eŭropaj aŭ amerikaj grandurboj. Al mi ŝajnis, ke la grandega sudĉina urbo kun siaj elegantaj vendejoj en novaj domkompleksejoj kaj modernaj nubskrapuloj pli similis al la centro de Unuiĝintaj Nacioj en Vieno, aŭ al usonaj urbocentroj "*downtown*", ol al ĉefurboj de Orienta Eŭropo. Kvankam antaŭ kelkaj jardekoj laŭ la urbobildo kaj laŭ salajroj kaj vivnivelo de la loĝantoj Ĉinio estis multe subevoluita de la tiam Orienta Eŭropo. Tio estas la rezulto de multjara proceso, ke en Ĉinio la ekonomia kresko estas daŭre 8-9 procentoj, dum en aliaj partoj de la mondo, inter alie ankaŭ en Hungario, tio stagnas.



En la tropika varmego estis agrable manĝi pecon da freŝa akvomelono aŭ alia tropika frukto. La stratoj estis inunditaj de moveblaj fruktobudoj, kie oni vendis senŝeligitajn fruktojn. Mi vidis similajn budojn antaŭ kelkaj monatoj ankaŭ en Italia urbo Venecio. La diferenco estis, ke en Italio la senŝeligitaj fruktopecoj kostis dekoble, ol en Ĉinio. Ĉi tie la prezo estis 1,5 juanoj kaj en Venecio 2 eŭroj.

Promenante plu survoje mi rigardis interesajn eventojn. En la strato plurloke homoj dancis, same kiel en Hanojo ĉe la lago Hoan Kiem. Aliaj ludis tabulludojn ĉe la tabloj metitaj en parkoj. En stratangulo eta scivola homamaso ĉirkaŭis surplanke sidantan junan viron. Apud la viro videble malsana, cirkaŭligita kokino kuŝis surplanke kun sanganta piedo. La viro parolis pri la pli granda efikeco de ĉina medicina scienco ol la okcidenta, kaj li informis nin pri iu ĉina mirakla medikamento, kiu efike kuracis seriozajn vundojn. Tiu miraklaĵo estis speciala pulvoro, el kiu li verŝis kuleron da kvanto en manplenan paperon kaj la paperon li volvis sur la pedon de la turmentita kokino.

Post tio li denove kunligis la piedojn de la kokino, li metis la birdon en korbon kaj kovris la korbon per tuko. Tiam li diris, ke la kokino post kvin minutoj foriros per propraj piedoj el tiu loko. Se iu ne kredus, li proponis, ke oni vetu kun li pri tio. Verŝajne jam pluraj homoj perdis ĉe li tian veton, ĉar antaŭ la viro kuŝis multe da monbiletoj surplanke, kiujn li kunbalais en tekono. Pro manko de tempo ni ne atendis la finon de tiu eksperimento, sed iris plu al la stacidomo por aĉeti trajnbileton al Wuhan.



En la stacidomo estis tre bonŝance havi ĉinparolantan kunulon. Ĉar tie ĉiuj oficistoj parolis nur ĉine kaj ĉio estis skribite nur ĉine. Tio estis memkomprenebla, ĉar apenaŭ estis eksterlandanoj en la urbo, do kial skribi la informojn en aliaj lingvoj? Sed bileton nek tiel ni sukcesis aĉeti. La kasistino diris, ke la lokoj por litvagonoj jam elĉerpiĝis por unu semajno. Mi pensis, ke estus tro lacige veturi la plurmil kilometran vojon sidante, tial mi decidis provi aĉeti busbileton por lita aŭtobuso.

Interese, nek la ĉinaj partoprenantoj de la kongreso el Wuhan sukcesis akiri litvagonan bileton, eĉ hodiaŭ mi ne scias kial. Ĉar ili loĝis tie en la urbo, parolis ĉine kaj konis la lokajn cirkonstancojn ekzemple la kutimon, kiam oni komencis vendi tiujn biletojn. Ilia gvidanto diris, ke ili veturis per haltotrajno. La trajno iris tre malrapide, haltis kaj atendis ofte kaj longe en diversaj lokoj kaj pro tio ili alvenis al Hanojo post 33-hora laciga trajnumado.

Laŭ tiu vidpunkto la situacio ne multe ŝanĝiĝis dum la lastaj jardekoj. Mi memoras, ke en la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento mi volis veturi de Pekino al Kantono kaj ankaŭ tiam mi sukcesis aĉeti litlokon nur post plurtaga provo. Tiam mi vidis surprize, ke plurcent homoj dormis sur la trotuaro en la placo antaŭ la stacidomo atendante iliajn trajnojn, ĉar multaj ricevis trajnbileton nur por post kelkaj tagoj. Estis tiel, ĉar ne estis facile kontentigi la bezonon de 1.34 miliardo da homoj.



Antaŭ la stacidoma placo ni vidis plurajn fruktovendajn budojn. La prezo de akvomelono estis 3 juanoj po kilogramo, do same kiel en Hungario. La specialgustaj etaj melonoj kostis 4 juanojn po kilogramo. Interese la prezoj estis skribitaj po duonkilogramoj kaj tiuj estis skribitaj sur preztabuloj. Do, sur la tabuloj estis skribite 2 juanoj, kion oni devis kompreni, ke la frukto kostis 4 juanoj po kilogramo. En Vjetnamio la prezoj estis trioble pli altaj. Fine mi aĉetis unu etan melonon por ĉ. 10 juanoj kaj grandegajn mangojn por 8 aŭ 9 juanoj. Tiuj mangoj kostis 7 juanojn po kilogramo. En Vjetnamio tio kostis duoble pli. Kaj eĉ la kvalito estis pli bona en Ĉinio, la pezo de unu frukto estis multe pli granda, ol unu kilogramo.

Poste Wang Qingsu rimarkis, ke apud la fruktovendistoj estis oficejo, kie estis skribite, ke oni vendis longdistancajn busbiletojn. Ni demandis do, ĉu ili havis lokon al Wuhan por la venonta tago. Bonŝance estis libera loko kaj ankaŭ la prezo estis favora. La busbiletoj estis 320 juanoj kaj tiu prezo inkluzivis veturkoston al pli, ol mil kilometroj kaj la uzon de lito en la buso. Ĉion kalkulite ĝi estis 40 dolaroj, dum en Hanojo en vojaĝoficejo oni volis doni al mi trajnbileton al Wuhan por 300 dolaroj.



Post tiu sukcesa biletaĉeta projekto ni iris tagmanĝi. Ni manĝis rostitajn kokinkolojn kun rizo, legoma garnaĵo, peklita ajlo, zingibra ĉina brasiko (kimĉio) kaj ananasa supo. Tio kostis 20 juanojn kaj post la pago mi komencis pensadi. Se ĉi tie la prezoj estis tiom malaltaj, kiel mi sukcesos elspezi la restintajn mil juanojn dum la restantaj naŭ tagoj? Laŭ tiuj prezoj tio ŝajnis esti tute neebla. Ĉar mi ja ne havas du stomakojn por dufoje tagmanĝi aŭ vespermanĝi tage.

Tial tiu stranga afero kaŭzis al mi zorgojn, ĉar mi jam antaŭvidis, ke forlasonte Ĉinion mi ne povos reŝanĝi miaj juanojn. Simile al miaj spertoj en la vjetnama-ĉina landlimo, kie mi tre malfacile povis ŝanĝi miajn dongojn al juanoj. Vidante tiujn malaltajn prezojn kaj mian modestan vivmanieron evidentiĝis, ke mi tute ne sukcesos elspezi tiom da mono dum iom pli ol unu semajno. Mia kolego Dajka Miklós en la parlamenta aŭditora oficejo kutimis diri: *"Gabor, kiel mi vidas, viaj problemoj ne estas ĉiutagaj"* Kvankam ŝajnas esti stranga fenomeno, tamen foje-foje okazas, ke problemo estas ankaŭ, se oni devas elspezi tro multe da mono en mallonga tempo. Nun en la venontaj tagoj ŝajne mi havos tiun situacion. Post agrabla tagmanĝo ni promenis al mia hotelo, ni manĝis akvomelonon kaj preparolis pri nia venontaga programo. Ni planis morgaŭ rigardi pliajn vivindaĵojn de la urbo apud rivero Jun ĉian, se ne pluvos.



SUR LA VOJOJ DE INTERNA AZIO

Kiel priparolite, la venontan matenon venis al mi Wang Qingsu kaj ĉar ne pluvis, ni iris kune matenmaĝi. Hieraŭ ŝi invitis min tagmanĝi, hodiaŭ – laŭ deca reciprokeco – mi devis inviti ŝin matenmanĝi. Kvankam mi ŝatintus iri al ĉina restoracio ŝi proponis tamen iri prefere al KFC (usonstila rapidmanĝejo). Ŝiaj argumentoj estis, ke sole en la mondo nur la ĉinaj filioj de KFC ricevis la rajton vendi lokajn naciajn manĝaĵojn en siaj manĝejoj. Kaj vere ni trovis tiajn unikajn manĝaĵojn, kiujn en similaj eŭropaj restoracioj certe ne eblus gustumi. Same kiel ni spertis antaŭ tago, ankaŭ ĉi tie la manĝo estis tre malmultekosta. Ni pagis 17 eŭrojn por matenmaĝo por du personoj, kiu konsistis el rizo, viandaĵo, ovaĵo, supo kaj deserto.

La juna viro kuracante kokinopiedojn sidis denove sur la trotuaro kaj ĉirkaŭ li estis eĉ pli granda homamaso, ol hieraŭ. Wang Qingsu estante mapli alta vidis nenion, sed mi estis pli alta kaj bone vidis, ke nun jam ankaŭ sango estis surplanke. La kokino estis denove en la korbo kovrite per tuko. La mano de juna viro jam estis bandaĝita kaj li subite batis sian manon per grandega ŝtono. La homoj ĉirkaŭ li ekveis. Mi pensis, ke li volis montri la efikon de la mirakla pulvoro kuracanta ankaŭ tiajn vundojn. Sed ni nek nun atendis la finon de la sanga spektaklo kaj promenis plu por atingi la urban Popolan ĝardenon.

La parko estis sufiĉe malproksima de la loko kie ni estis, do ni decidis uzi lokan buson. La busoj kursis po 2-3 minutoj, la aspekto estis multe pli bela ol la aspekto de la busoj en Budapeŝto kaj la prezo estis nur unu juano. La prezo de budapeŝtaj busbiletoj estas dekoble pli alta kaj malgraŭ tio, la sistemo ne funkcias. La Budapeŝta Trafika Entrepreno funkcias konstante rande de bankroto. Antaŭ kelkaj semajnoj mi ĉeestis konsternan scenon, ke pasaĝero ne havante bileton diris al la kontrolisto en la buslinio 198 en Budapeŝto, ke li nek aĉetos bileton, nek forlasos la buson.

Tiam laŭ la peto de tri kontrolistoj la ŝoforo haltigis la buson, fermis la pordon de la buso kaj ili vokis policon. Post 10-15 minutoj alvenis

policaŭto alarmita per blua signalilo kaj eliris el ĝi kvar policanoj. Ili petis la dokumentojn de la viro kaj demandis: ĉu li donas mem siajn datumojn al la kontrolistoj. La viro neis tion, tiam ankaŭ la policanoj komencis telefonadi al siaj ĉefoj por demandi, kion ili faru. Ankaŭ la ŝoforon vokis konstante lia ĉefo kaj proponis, ke la ŝoforo lasu la senbiletan homon veturi plu. Laŭ la ĉefo la situacio estus eĉ pli malbone, se unu buso elfalus en la kurso.

Fine la policanoj registris la datumojn de la viro kaj foriris plu per alarmaj bluaj lumpulsadoj. La senbiletita pasaĝero kaj la kontrolistoj restis en la bushaltejo. Mi pensas, ke post kelkaj minutoj ili ĉiuj eksidis al la venontan buson, la senbiletulo daŭre sen bileto, kaj ĉiuj iris plu. Estis surprize konsterna, ke por aranĝi tian aferon oni bezonis laŭ la aktualaj malnormalaj hungaraj leĝoj ok oficialajn homojn (eĉ entute dek, se oni kalkulas ankaŭ iliajn ĉefojn telefone engaĝitajn). Sed kiel ni vidis, ili eĉ dekope ne sukcesis solvi la aferon.



Modernaj konstruaĵoj en Nanning

Ĉinoj ĉiujn similajn aferojn sukcesas solvi tre simple. Apud la ŝoforo estas monkesto kaj enirante ĉiu pasaĝero devas ĵeti en ĝin la prezon. Se iu ne ĵetas la monon, tiam la ŝoforo ne lasas la homon enbusiĝi. Oni aranĝas la aferon tiel simple kaj mi vidis en Nanning ke la sistemo funkcias tre bone.

En la publika transporto de Nanning estas uzataj ankaŭ luksaj klimatizitaj busoj, la prezo en ili estas 2 juanoj. En Nanning la busoj estas multe pli altaj, ol en Budapeŝto, la malaltaj ĉinoj eĉ ne atingas ĝian plafonon. Kiam ni eniris la buson, tiam ĉinaj pasaĝeroj petis min malfermi la supran lukon por havi iom da ventolado en la stufa somera varmego.

Laŭ la liberala pensmaniero disvastigita en Hungario en la lastaj jardekoj estis establitaj leĝoj laŭ kiuj la kontrolistoj ne rajtas postuli legitimilojn de la senbiletaj pasaĝeroj. Tial nepago en la veturiloj fariĝis kutima afero kaj la entrepreno havis miliardojn da malprofito. Fariĝis kutimo ankaŭ la vandala seĝodistranĉado, skribaĉado sur muroj kaj acidaj trivigoj de fenestroj. Tial multaj hungaraj veturilaroj aspektas kiel aŭtoruinoj en Budapeŝto. Kompare al tiuj la aŭtobusoj de Nanning ŝajnas esti modernaj kaj elegantaj.

Post trihalteja busveturo ni alvenis al la Parko de Popolo. Ĝi estas simila al la budapeŝta Urba Parko, en ĝi karuseloj, gigantradoj, kaj infanfervojoj funkcias. En tiu ludparko ni spertis agrablan orientecan etoson, kiam ni promenis ĉirkaŭ eta lago en botanika ĝardeno. Post ĉirkaŭpromeno de la lago ni rimarkis kuiristojn de apudlaga restoracio. Ili rigardis la baraktadon de rato falita en kaptilon. Irante pli proksimen mi demandis, ĉu ili kuiras tiun raton. Ĉar se jes, mi ankaŭ ĉi tie ne kuraĝos manĝi viandaĵojn same kiel en Vjetnamio, kie mi vidis la rostitajn hundojn. En Eŭropo oni ne alkiutimiĝis al manĝo de tiutipaj bestoj. Bonŝance la kelneroj trankviligis min, ke ili ne kuiras la raton. Ĝuste inverse, ili kaptis la beston ĉar ĝi regule ŝtelmanĝis iliajn nutraĵojn en la deponejoj.

Elirante el la Parko de Popolo ni troviĝis en bazaro. La prezoj ankaŭ ĉi tie estis malaltaj. La prezo de granato estis 6 juanoj po kilogramo, tial mi aĉetis pli ol unu kaj duonkilogramojn por manĝi ilin survoje

dum la vojaĝo al Wuhan. Wang Quingsu aĉetis por si bananojn, kaj donis ankaŭ al mi du pecojn por ke mi manĝu survoje en la longa vojo ne nur granatojn. Ni trovis manĝejon en la bazaro, kie oni povis aĉeti buljonon tian, kian mi manĝis kutime en Hanojo en matenoj. En Vjetnamio mi pagis por ĝi unu eŭron, ĉi tie ĝi kostis 2 juanojn, do ĉirkaŭ 30 dolarcendoj.

Promeninte plu en la nanninga bazaro mi trovis tiun kuriozan importitan frukton en Tajlando, kiun mi pleje ŝatas el la tropikaj fruktoj. Ĝia nomo estas "durian" aŭ alinome "cibetfrukto". Ĝi estas tre speciala fruktospeco, la sola planto kiun manĝas ankaŭ tigro. La aromo de tiu freŝa frukto estas nekomporebla kun io ajn, ĝia substanco estas kremeca kiel ovoŝaŭmkuko kaj la gusto similas al la vanilo. Sed ĝiaodoro estas tiom penetra, ke enporti ĝin estas malpermesita en multaj hoteloj, busoj kaj aviadiloj. Tie en la nanninga bazaro ni gustumis ĝin ne freŝe, sed freŝe bakite en volvita kuko. La frukto povas kreski ĝis 2-3 kilogramoj kaj ekstere kovras ĝin nekredeble pikaj grandaj dornoj. La manĝeblan internan parton eblas eltranĉi nur per ege akraj tranĉiloj.

Ankaŭ verdaj migdalformaj semoj estis aĉeteblaj por 6 juanoj po kilogramo, sed mi ne aĉetis el tiuj, ĉar la gusto estis tro amara. Simile kiel kruda glano en kverkarbaro en Hungario. Post kelkaj tagoj mi trovis similajn semojn en Wuhan kaj miaj esperantistaj geamikoj klarigis al mi, ke ili estis lotussemoj. Se oni manĝas la semojn sen ĝermodoj, tiam la gusto tute ne estas amara. Ĉi tie en la nanninga bazaro estis la plej malgrandaj la fruktoprezoj, kiujn mi trovis en Sud-Orienta Azio. Ĝis nun mi pensis, ke la thailandaj prezoj estis la plej malaltaj, tamen mi devis konkludi, ke la nanningaj prezoj estas la plej favoraj. Ĉi tie ĉio estas sufiĉe malmultekosta, ĉefe kompare al eŭropaj prezoj. Ekzemple grandegaj persikoj vendiĝis por 6 juanoj po kilogramoj en Nanning, tio estas nekredebla malalta prezo en Eŭropo.

Post aĉeto de fruktoj ni iris al la hotelo. Ni veturis denove per buso tri haltejojn, sed nun per klimatizita buso. Elirante ĉe la finhaltejo nek Wang Quingsu sciis subite al kiu direkto ni iru. Ŝi demandis

preterpasintan ĉinan knabinon, sed ŝi ridetante intence sendis nin en la inversan direkton. Fine la situacio baldaŭ klariĝis kaj post kelkaj minutoj ni bonŝance revenis al la hotelo. La manaĝero de la hotelo estis rigardanta televidon. Kvankam la hotelo estas anoncita en la interreto ankaŭ por eksterlandaj vojaĝantoj, tamen estas eĉ nek unu fremdlingva televida kanalo en la televida reto. La modernaj televidoj en la ĉambroj kabaplas montri 150 televidajn elsendojn, ĉiuj bone funkcias, sed ĉiuj estas ĉinlingvaj.

Poste Wang Qingsu akompanis min al la busstacio, aŭ pli precize ni iris tien kune per taksio. Tio estis granda helpo, ĉar mi ne devis longe klarigadi kien mi volas iri. Eĉ la ŝoforo redemandis ĉu ni iru laŭ la pli longa ringvojo ĉirkaŭanta la urbon anstataŭ la plenŝtopita urbocentro. Mi elektis la lastan kaj tiel tiu dekkelk-kilometra vojo kostis nur 37 juanojn. Wang Qingsu ne atendis min eniri la buson, ĉar ŝi ankoraŭ samtage vespere planis veturi hejmen al la urbo de prezidento Mao. Ŝia filino loĝas 20 minutojn de la busstacio, do ni manĝis grandan porcion da glaciaĵo en la busstacio, poste ni adiaŭis unu la alian kaj ŝi trapromenis al sia filino.



En la busstacio denove mi estis la nura eŭropa homo. Ĉi tie estis jam ĉio skribite nur en la ĉina lingvo, sed kiel mi spertis nek tiu informo estis ĉiam ĝusta en 100 procentoj. Antaŭ ekvojaĝo mi lernis skribi kaj legi la ĉinajn signojn de Wuhan en la ĉina lingvo. Pro tio mi povis legi sur mia bileto, ke la ekiro de la buso okazos je la 18:30 kaj enbuŝiĝo estos tra pordo 18. Tri-kvar minutojn antaŭ la ekiro la 18-a pordo ankoraŭ ne estis malfermita, tial mi rapide iris al la 19-a. Evidentiĝis, ke mi bone faris, ĉar vere ni estis enlasitaj tie. Estis grave eniri ne tiun buson kiu staris ĉe pordo 18, sed en alian, sur kiu estis skribite la ĉinaj ideogramoj de Wuhan.

Ĉe la enbusiĝo mi rimarkis, ke la buso verŝajne ne startis en Nanning, ĉar la veturilo estis jam preskaŭ plena de veturantoj. Same kiel la nanningaj busoj ankaŭ tiu ĉi estis pura ekstere-interne, mi vidis enirante ĉiujn pasaĝerojn demeti la ŝuojn ĉe la pordo, enmeti en platan sakon kaj paŝi nur nudpiede en la buso. Ankaŭ mi faris same kaj komencis serĉi mian liton, kies numero estis 26 laŭ mia bileto. Sed la kondukto montris al mi per mansigno, ke mi kuŝu sur la mezan liton de la unua vico en la supra etaĝo. (Estis ankaŭ subaj litoj kiuj estis muntitaj praktike sur la planko.) En la buso estis nur litoj, sidlokoj tute ne estis instalitaj.

Post iom da tempo mi rimarkis pisodoron kaj unue pensis, ke eble la kovrilo, aŭ litaĵo ne estis pura. Kovrilo cetere estis tre bezonata, ĉar la klimatizilo funkciis forte kaj mi preskaŭ frostis sub la kovrilo. Se mi sciintus, ke estos tiom malvarme, mi survestintus ian longmanikan ĉemizon aŭ puloveron por la nokto. Sed ekster la buso estis peza tropika varma aero kaj pro tio mi ne pensis pri tio. Ĉirkaŭflarante la kovrilon mi konstatis, ke ĝi estis pura kaj freŝodora. Tial mi pensis, ke verŝajne ĉe bebo estis ŝanĝita la vindotuko ie en la malantaŭa parto de la buso kaj ĝi odoris pise.

Sed poste klariĝis la kaŭzo de la fenomeno. En Ĉinio estas ne tiaj kutimaj distancoj kiel en Eŭropo. En la eŭropaj aŭtovojoj po 25-30 minuta veturo estas benzinejoj kun necesejoj. Sed en Ĉinio la distancoj estas pli grandaj kaj tie ne estas tiaj instalaĵoj. Kiam hazarde mi rigardis tra la fenestro, tiam mi vidis, ke ni estis ĝuste ĉe

kilometra ŝtono 2850. Ankaŭ nia buso veturis pli ol mil kilometran distancon. Se la buso haltus en ĉiuj du horoj, tiam la veturtempo plilongiĝus.

Tial la buso haltis nur unufoje en la pli ol milkilometra vojo, proksime al Nanning. Por kontentigi la bezonon, necesejo estis instalita meze de la buso, kiel kutime en trajno. Kaj nature ne eblas fari necesejon sube malfermitan, kiel ĉe la fervojo, ĉar tiukaze la piso inundus la ŝoseon. Do, tiu kolektado de piso en necesejoj post iom da tempo inundis la tutan buson per pisodoro, kaj tio estis nekutima por eŭropanoj.

Ankaŭ la konstanta fumando de ŝoforoj ĝenis min iomete. Malgraŭ tio, ke ŝildo sur la muro malpermesis fumadon kaj ili po duonhoro multe kraĉis tra la malfermita fenestro. Sed entute kun ĉiuj ĝenaj malagrablajoj mi pensas, ke la ĉina trajno- kaj busvojaĝo-sistemo estas multe pli bona, ol la hungara. Ĉefe se ni konsideras, ke en Ĉinio oni devas kontentigi la vojaĝan bezonon de 1.3 miliardo da homoj, sed en Budapeŝto nur 2 milionojn, tamen en Hungario oni ne sukcesas fari tion. Enirante en buson en Nanning kaj poste ekzemple la budapeŝtan antaŭurban trajnon "HÉV" al urbo Szentendre tuj konstatablas la diferenco. En tiuj trajnoj la seĝoj estas malpurigitaj, la kovriloj sur ili estas tranĉitaj, la fenestroj detruigitaj, do ili aspektas trajnoruinoj.

La ŝoforoj povis paroli kun mi en eŭropaj lingvoj nek unu vorton. Sed kiam mi montis ĉine kien mi volis iri, tiam ili estis tre helpemaj. Ili demandis plurajn lokajn pasaĝerojn, kie estis la hotelo, kie mi volis tranokti kaj klariĝis, ke ĝuste en tiu strato, kie alvenos nia buso. Taksiisto portis min al la hotelo por 7 juanoj sed laŭ lokaj kutimoj li aldonis ankoraŭ 2 juanojn kiel benzinkostojn. Sed eĉ kun tiu aldono la prezo estis malpli ol 1.30 dolaroj, do malpli ol unu budapeŝta busbileto.

En la hotelo en Wuhan mi estis akceptita amikece kaj helpeme. Kvankam la ĉambron mi povintus ricevi nur post la dua horo posttagmeze, oni donis la ŝlosilon al mi tuj. Pli ĝuste ne ŝlosilon, ĉar magnetokarta sistemo funkciis en la hotelo. Tio signifas, ke oni devis

montri la karton al la sensilo apud la klinko por malfermi la seruron. Enirante la ĉambrom mi metis la karton en la sensilujon apud la pordo por ebligi kurentouzon de la ĉambro. Post la eltiro de la karto la ĉambro estis aŭtomate malŝaltita de la kurento. Okupante la ĉambrom mi duŝis agrable en la komforta banĉambro kaj forlavis la polvon de la vojaĝo. Poste mi foriris manĝi ion varman. Ĉar dumvoje mi rongiŝ nur la granatojn, bananojn kaj la vjetnamajn kokosajn keksojn.

Mi trovis en la proksimo kvar-kvin restoraciojn, mi eniris en tiu, kiu ofertis t.n. svedtablan bufedan sistemon. Tie estis metita surtable ĉ. tridek diversaj manĝoj kaj mi mem povis preni kion kaj kiom mi volis sur mian teleron. Fine ĝi la pezo de la manĝoj estis pesita kaj mi pagis laŭ pezo por la variaj bongustegaj manĝoj kun rizo kaj supo entute 18 juanojn. Vidinte la malaltajn prezojn daŭre restis mia plej granda problemo kiel mi elspezu en la venonta semajno tiujn mil popolajn juanojn, kujn mi ŝanĝis laŭ konsilo de Wang Quingsu en Nanning.



Rato en kaptejo apud restoracio en la Popola Parko en Nanning

SUR LA BORDO DE LA LONGA RIVERO

La nomon de urbo Wuhan eblas skribi per la jenaj signoj: 武汉. La urbo estas ĉe la bordo de rivevo Ĉang Ĉiang (laŭ la eŭropa nomo Jangce), kiu estas la dua plej longa rivero de la mondo. La unua estas Nilo, la tria Amazono kaj la kvara Misisipo. La signifo de la du ĉinaj signoj de la rivero estas "Longa Rivero".

En mia unua nokto ĉe la Longa Rivero mi povis dormi bone, mia lito en la hotelĉambro estis tre komforta. Tiu gastejo ankaŭ laŭ eŭropaj kriterioj estis tre altnivela kategoria, tielnomata "business hotel" kaj tie eĉ la plej ĉiutagaj instalaĵoj (sapujo, cindrujo, ktp.) estis faritaj el valoraj ĉinaj porcelanoj. Malkiel en mia hotelo en Hanojo, ĉi tie ĉio bone funkciis. En la teleregilo de la klimatizilo ĉi tie bone funkciis la pilo, sed en la televido ankaŭ ĉi tie eblas rigardi nur ĉinlingvajn programojn.

En la hotelo oni okupiĝis ankaŭ pri diversaj oficejaj servoj: telefakso, fotokopiado, tajpado, telefono, organizado de vojaĝoj, biletvendado, organizado de konferencoj, ktp. estis mendebla en tiu oficejo laŭ la gastlibro de la hotelo. Eble estis rilato inter tiuj servoj kaj la fakto, ke mi ricevis en ĉiu horo kaj duono amason de koloraj flugfolioj sub mian pordon aŭ en la pordokadron. Sur tiuj kartoj videblis fotoj de aziaj knabinoj vestitaj en bikinio aŭ apenaŭ io kune kun iliaj telefonnumeroj kaj por mi nekompreneblaj ĉinaj signoj. Mi povis deĉifri el la subskriboj, ke la knabinoj estis altelefoneblaj iam ajn en 24 horoj per la aldonitaj telefonnumeroj, sed mi ne povis diveni el la komplikaĵoj ĉinaj singoj, pri kiuj servoj ili okupiĝis el la listigitaj servoj.

Mi vestiĝis kaj poste iris en la urbon por metenmanĝi ion. En la apuda domo funkciis kukofritejo. La rapide frititaj panpastaĵoj estis samgustaj kiel en Hungario. Ĝia formo ne estis ronda, kiel en mia lando, sed similis al du longaj bastonoj. Ankaŭ la grandeco de tiu azia panflano estis simila al la hungara. La prezo estis nur triono de la budapeŝta prezo, mi pagis por ĝi nur du juanojn. Poste mi trairis al la vid-al-vida superbazaro por aĉeti ankaŭ iun eŭropan manĝon post pluraj semajnoj. Mi trovis 200 graman etpakitan ŝinkon por 15 juanoj

kaj mi volis aĉeti ĝin tuj. Sed kiam mi legis kiom da artefaritaj aldonajoj estis ene: sojo, sodo, nitrito aŭ nitrato, gustointensigilo, substanco-koncentrigilo, stabiligilo, ktp, ktp..., tiam mia emo por aĉeti la ŝinkon tute malaperis. Anstataŭ ĝi mi aĉetis teleron da freŝe kuirita densa nudelosupo por tri juanoj. Mi pensadis: ĉu mi aĉetu ankoraŭ unu freŝe frititan varmegan kukon, sed mi konstatis, ke mi havis nur unu stomakon. Mi jam manĝis tiom, ke mi bone kaj sate fartos ĝis vespero. Mi konkludis denove, ke tiel estos malfacile elspezi miajn preskaŭ netuŝitajn mil juanojn dum la venontaj tagoj.

Kvankam post la abunda matenmanĝo eĉ posttagmeze mi ne estis malsata, tamen por iom foruzi la monon je la tria horo mi promenis al la restoracio apud la hotelo. Ankaŭ tiam estis multegaj diversaj manĝoj surtable kaj ĉifoje mi metis la teleron plene per ekzotikaj manĝaĵoj. La telero estis tiom plena, ke je la fino la rostitaj avelosemoj jam forrulis el la telero. Mi prenis rostitan melongenon, stufitan ĉinan fungon, rostitan viandon, korean terpomon, rostitan paprikon, stufitan fazeolon, karoton, stufitajn tropikajn legomojn, riznudelon kaj ankaŭ multajn aliaĵojn. Pesante ĝin mi vidis, ke ĝi kostis nur 13 juanojn por la tuto. Kaj aldone la kuiristino montradis, ke mi prenu kuraĝe ankoraŭ teleron da rizo kaj ankaŭ supon, ĉar tiuj jam estis aldone senpagaj.

Ĉar en la tropika varmo oni bezonas sufiĉe multe da likvaĵo, tial mi kutime aĉetis tre multajn fruktojn ĉiutage. Hieraŭ mi aĉetis akvomelonon, kaj hodiaŭ ekstere blankan flavan melonon, kian en Eŭropo mi ankoraŭ ne vidis. Ĝi estis kurioze la inverso de la bananohomo, kiu estas – kiel ni scias – ekstere flava kaj interne blanka.

Post la abunda tagmanĝo kaj fruktoaĉeto mi reiris al la hotelo kie baldaŭ iu frapetis mian pordon. Peng Zhengming (Trigo), la prezidanto de la Hubeja Provinca Esperanto Asocio venis min viziti. Urbo Wuhan estas la ĉefurbo de provinco Hubej. Mi jam korespondis kun li pli frue kaj kiam ni renkontiĝis en Hanojo, tiam mi diris al li, ke mi loĝos en tiu ĉi hotelo. Tiam li petis min sendi al li retleteron post mia alveno kaj konforme al tio mi sendis mesaĝon al li la pasintan tagon. Sed nur nun klariĝis, ke la sistemo pro iu kaŭzo ne sendis al li mian

leteron, kvankam mi eksciis, ke la interreta sistemo devus liveri mian leteron nur 200 metrojn. La prezidanto hazarde loĝis en la strato de mia hotelo, estis nur kelkaj domoj inter lia loĝejo kaj mia hotelo. Ŝajne en Ĉinio ne bone funkcias la interreta korespondado.



Post mallonga babilo ni iris promeni al la urbocentro kaj al proksima parko. Survoje mi vidis la samon, kiel en Nanning, ankaŭ ĉi tie estis

amaso da fascinaj, modernaj novaj nuboskrapuloj, kiuj formis la negocistan centron de la provinca ĉefurbo. Laŭ oficiala statistiko okmiliono da homoj loĝas en la urbo, sed se oni kalkulas ankaŭ la multajn provizore tie loĝantojn, tiam eble dek milionoj da homoj troviĝas en Wuhan.

Intertempe mi demandis, kiel mi povus iri al la flughaveno kaj mi trovis, ke la finhaltejo de la flughavena buslinio estis ĝuste en la najbara strato. Tiel mi povos veturi buse kaj tiam mi ne bezonos superflue forĵeti pli ol ducent juanojn por taksio.

Peng Zhengming surstrate parolis kun la homoj parolante la wuhanan dialekton. Ĝi estas tiom malsimila al la pekina dialekto, ke ofte ne eblas kompreni ĝin. En Ĉinio oni parolas tre multajn lingvojn kaj dialektojn. Eŭropanoj unue ekhavis rilaton kun Ĉinio tra Hongkongo kaj Kantono kaj tial multaj ĉinaj vortoj kaj urbonomoj laŭ tiu dialekto estis uzataj en multaj eŭropaj lingvoj. Ekzemple la nomo de tiu sudĉina urbo estas Kanton en multaj eŭropaj lingvoj, kvankam laŭ la pekina dialekto oni prononcas ĝin, kiel Guong Gou. Same kiel la nomo de la ĉefurbo de Ĉinio estas laŭ la kantona dialekto Peking, sed laŭ la pekina dialekto Bejĝing.

Kiam la ĉina civila milito finiĝis kaj la malvenkinta Ĉang Kaj Sek retiriĝis kun la fuĝintaj amasoj al la insulo Tajvan, tiam la tie kunveninaj homoj ne komprenis unu la alian. Ili alvenis el la plej diversaj partoj de Ĉino. Tial okazis kaj okazas ankaŭ nun, ke la tajvana televido ĉiam elsendas siajn ĉinlingvajn elsendojn kun subteksto. Ĉiuj ĉinoj povas legi kaj kompreni ilin kaj tio estas grava avantaĝo de la cetere ekstreme komplika ĉina skribsistemo.

Promenante en la stratoj nokte lumigite, ni vidis multloke amatorajn kantistojn kaj aktorojn fari spektaklojn en publikaj lokoj. Plurloke estis metita magnetofono surplancken kaj oni dancis ĉirkaŭ ĝi. Dek, aŭ dekkvin homoj kantis kaj dancis kune, kiel mi vidis en Hanojo apud la lago Hoan Kiem. Kiam mi sidis inter la spektantoj, tiam ĉiuj rigardis min kaj ili pensadis, kiel mi sukcesis aperi tie. Estas superflue diri, ke mi estis la sola eksterlandano en la amaso. Multaj nur kaŭris aŭ sidis surplanke, kelkaj sidis apud mi sur la ŝtonoj de la

parko. Estis nur kelkaj homoj kiuj kunportis ankaŭ tabureton por sidi sur ĝi. Kiam ankaŭ mi eksidis japanmaniere surplanken, tiam pluraj volis doni al mi iliajn taburetojn, ke mi sidu sur ĝi. Iu ĉina virino, multe pli aĝa ol mi, volis trudi al mi sian kuseneton por meti ĝin almenaŭ sub miaj genuoj. Mi apenaŭ sukcesis danki kaj montri, ke ĝi ne estas bezonata, ĉar mi alkutimiĝis en Japanio al tiu sidmaniero.

Intertempe ni iris preter pluraj etaj restoracioj kaj rilate al ili mi demandis Peng Zhengming, ĉu oni manĝis hundaĵon aŭ kataĵon en Wuhan. Li diris, ke en tiu urbo oni manĝis hundaĵon ĉefe vintre, ĉar la lokuloj opinias ke ĝi varmigas la korpon. Kataĵon oni manĝas precipe en Kanton, en Wuhan tio ne estas kutimo. Post abunda promeno mi revenis al mia hotelo malfrue vespere.

La venontan matenon je la 9-a horo Peng Zhengming denove frapetis mian pordon. Li venis, ĉar ni interkonsentis la pasintan vesperon, ke hodiaŭ ni promenos ĉe la bordo de Jangce. Antaŭ ol li alvenis, mi jam kuris al la najbara bazaro por manĝi du frititajn kukojn por matenmanĝo. Mi vidis ĝoĝe, ke Peng Zhengming kunportis du ombrelojn, ĉar mi lasis mian hejme. Por ĝi jam ne plu estis loko en mia valizo. La ombrelo estis utila por fortimigi la pluvon, ĉar bonŝance la vetero estis agrable nuba dum la tuta tago. Nek pluvis, nek oni devis suferi pro forta sunbrilo.

Mi vidis sur la mapo, ke facile eblis iri en la strato de mia hotelo ĝis la rivero Jangce. Sed Peng Zhengming proponis tamen ne iri tien, sed sur strato Zhang Zhi Dong, ĉar tie ni povos vidi pli multajn interesajn vidindaĵojn. Li pravis. Ni vidis unue belan taoisman preĝejon, sed nun ni ne iris en ĝin. Sed ni longe pasigis tempon en budhisma preĝejo en la venonta stratangulo, eĉ tie ni fariĝis partoprenantoj de memora ceremonio pri iu mortinto.

Poste ni alvenis al la memormuzeo pri la fama ribelo en Wuhan en la jaro 1911. Antaŭ la enirejo staris la vivgranda skulptaĵo de Sun Zhongshan (laŭ eŭropa nomo: Dr. Sun Jat Sen). Li estas konata pri sia grava rolo en la kreado de la moderna Ĉinio. Li estis la instruisto de Mao Ce Tung kaj Ĉang Kaj Sek. En tiu tempo eŭropanoj volis ricevi ekskluzivan rolon en la ĉina fervojkonstruado kaj tiun

klopodon subtenis ankaŭ la imperiestra kortego. Sed ĉinoj ribelis kontraŭ tio kaj la wuhana armeo eniris en la batalo kun imperiestra potenco. La militon apud Jangce venkis la ribelantoj. Sekve plifortiĝis la revolucia febro en la tuta lando kies sekvo estis la falo de la imperiestra reĝimo. Poste la sendependaj provincestroj proklamis la respublikon kaj elektis prezidento D-ron Sun Jat Sen.

Ĉar la sud-ĉina suno brilis varmege, ni pensis, ke estus bone freŝiĝi per malvarma glacikremo. Peng Zhengming elektis tradician ĉinan glacikremon, kiu kostis nur unu juanon po peco. Ĝi estis malkara, kvankam eble ĝi estis iom pli bongusta, ol la pli moderna versio por du juanoj volvita per ĉokolado. Poste mi testis plurajn specojn kaj konkludis, ke la plej malbona estis la plej kara, sesjuana glaciaĵo en funelo.

Poste mi rimarkis, ke ombrelaspekta verda planto estis vendata surstrate. Peng Zhengming klarigis, ke ĝi estis la frukto de lotuso. La gusto de la semoj en la frukto, kaj ĝia formo kaj grandeco similis al la turka avelo, oni nur devis atenti ne manĝi la verdan ĝermon meze de la semo. Ĉar ties gusto estis tre amara, ĝi estis uzata prefere kiel teo. Eble antaŭ kelkaj tagoj mi gustumis tiun planton en la nanninga bazaro, nur tiam mi ankoraŭ ne sciis, kiel mi manĝu la semon ĝuste. Verŝajne tial ŝajnis ĝia gusto neĝueble amara antaŭ kelkaj tagoj.

Poste ni forlasis la amason da mondermaj nuboskrapuloj kaj iris en la malnovan kvartalon. Tiel mi ricevis eblon iom enrigardi kiel aspektis la malnova Wuhan. Mi bone fiksas tiun bildon en mia memoro, ĉar se daŭros evoluo de la urbo tiel plu, tiam tiuj restaĵoj de la pasinto post kelkaj jaroj fine malaperos el la urbobildo. Daŭriginte plu, la strato subite finiĝis kaj la grandega timiga rivero aperis antaŭ ni, envolvita en lakteca densa nebulo. Tiu rivero estis la atestanto de mondhistorie signifaj eventoj en la lastaj jarcentoj.

Post mallonga promeno ni iris per ŝipo al la alia bordo de la rivero kaj promenis laŭ la fama riverborda promenejo. Antaŭe post la opia milito – simile al Ŝanhajo – ankaŭ ĉi tie estis eksterlanda koncesia zono. Onidire tiam en Ŝanhajo estis skribite sur tabulo ĉe la limo de la koncesia teritorio: "*Por ĉinoj kaj hundoj eniri malpermesite!*" Ĉi

tie en Wuhan ne estis skribitaj similaj vortoj, sed ĉinoj nek ĉi tie rajtis eniri en la koncesian zonon.

Post longa promeno ni eniris en la preĝejon de Drakoreĝo en kies dua eteĝo estis ankaŭ budhisma sanktejo. Sed ĝi estis fermita por vizitantoj. Kiam la gardistoj vidis, ke mi dece kliniĝis antaŭ la kultaj lokoj, do mi kondukis laŭ la supozita maniero en preĝejo, tiam ili forigis la barilon kaj proponis, ke mi vizitu ankaŭ la budhistan parton de la sanktejo.

Dum la koncesia tempo la plej alta konstruaĵo de la urbo estis la doganoficejo. Hodiaŭ sur ties pinto la vento flirtigas la flagon de la Popola Respubliko de Ĉinio. Kiam ĝi estis ankoraŭ koncesia zono, tiam la turhorloĝo sur la pinto de la domo ĉiumatene ludis la britan himnon "*Dio benu la reĝon...*". Poste la tempoj ŝanĝiĝis kaj venis la revolucio kaj la civila milito, el kiu Mao Ce Tung fariĝis venkinto. Poste la turhorloĝo ludis jam alian melodion en matenoj: "*Vekiĝis la Suno, Ruĝiĝis la ĉielo, Prezidento Mao aperis en Ĉinio...*". Ankaŭ ekde tiam pasis kelkaj jardekoj kaj la situacio denove ŝanĝiĝis iomete. Kvankam la bildo de prezidento Mao estas ankaŭ hodiaŭ sur ĉiu mono kaj lia vivgranda (aŭ eble eĉ iom pli) skulptaĵo ankaŭ hodiaŭ staras tie antaŭ la enirejo de la Wuhana Universitato, la turhorloĝo ne plu ludas la patriotan Mao-laŭdan muzikon. Kiel mi aŭdis la horloĝo difektiĝis kaj neniam sukcesis tute ripari ĝin.

Ĉirkaŭ la iama doganejo kreskis grandegaj modernaj nuboskrapuloj el la tero, kiel simboloj de la moderna Ĉinio. Laŭ opinioj de multaj ekonomistoj, en tiu lando oni konstruas eble la plej fortan ekonomion de la mondo. Tiel la doganoficejo, kiu estis la plej alta konstruaĵo de la urbo en la koncesia tempo, hodiaŭ eble estas la plej malalta domo de la ĉirkaŭaĵo. Tamen tiu konstruaĵo restas en sia origina formo, kiel memorigejo de la pasinta historia epoko. Dum mia vizito la promenejo ĉe la bordo de Jangce estis plena de ludantaj ĉinaj infanoj. Junaj ĉinaj paroj kaj geavoj kun iliaj nepoj promenis kaj ludis en la agrable varmeta akvo de la rivero. Inter la multegaj ĉinaj homoj certe mi estis la sola eksterlanda promenanto en tiu promenejo. Tio okazis en la loko, kie nur eksterlandanoj havis la privilegion eniri dum la koncesia tempo kaj kie averaĝa ĉino neniam en la vivo rajtis promeni.



LOTUS-ARBARO ĈE LA ORIENTA LAGO

Post la longa promeno ĉe la bordo de la Longa rivero Peng Zhengming demandis min ĉu mi estis tre malsata kaj laca. Ĉar ni ambaŭ manĝis lastan fojon nur matene tial ni eniris tagmanĝi en proksiman musliman restoracion. Tie ni manĝis tre bongustan "ramen" supon tiom densan, ke la manĝbastonetoj kvazaŭ staris en ĝi.

Poste ni enbusiĝis kaj iris al unu el la ŝatataj feriejoj de Wuhan, ĉe la bordo de la Orienta lago. Intertempe ni preteriris la kampuson de la Wuhan Universitato kaj ni vidis tra la fenestro de la aŭtobuso, ke la skulptaĵo de prezidento Mao salutis la preterpasantojn antaŭ la enirejo. La urbo iam estis lia ŝatata restadloko. Mao ŝatis naĝadi tie en la centro de la urbo en rivero Jangce kaj la iama gvidanto havis ankaŭ rezidejon en unu el la duoninsuloj de la Orienta lago. Ĉe la lago grandega floranta lotusarbaro akceptis nin kaj poste ni pasigis la ceteran parton de la tago. Ni promenadis longe inter la praaj specialaj arbospecoj kaj nur malofte ni eksidis sur benkon por admiri la grandegan, violkoloran lagobordon, kie svarmis lotusfloroj.

Lotuso estas utiligata en Ĉinio plurmaniere. Ĉinoj simile admiras la belecon de iliaj floroj, kiel japanoj la belecon de ĉerizarbaj floroj. Tiam oni organizas festivalojn ĉe la bordo de la lagoj svarmantaj de lotusoj. Oni rostas la radikon de la lotuso, manĝas la kernon kiel frandaĵon (same kiel eŭropanoj manĝas avelon) kaj oni faras kurac-efikan teon el la amara ĝermo, kiu troveblas meze de la kerno.

Post la longa tago pasigita per promeno ni ekiris per loka buso al mia hotelo. Peng Zhengming telefonis hejmen por demandi: ĉu estis hejme sufiĉe da manĝaĵo por vespermanĝi kune. Ŝia edzino diris, ke estis pluraj diversaj, ni iru volonte. Kiam ni alvenis, tiam jam estis surtable la rostita fiŝo, rostita lotusradiko, korea kimĉi-simila zingib-
ra peklita ĉina brasiko, en oleo stufitaj molaj kaj tamen freŝaj folioj de hubejaj legomaĵoj kun stufita porkobulo-supu lozigita per ovoj, malmoligita tofuo, rizo kaj pizosupo kun biero. Tiel aspektis averaĝa ĉiataga vespermanĝo en la hejmo de la prezidanto, sed tio al mi ŝajnis esti riĉa princa vespermanĝo. Post la vespermanĝo kaj

amiketosa babilo mi venis hejmen al mia hotelo trans la placo nur vespere, je la oka horo.

La venontan tagon matene je la deka Ding Ĵi atendis min ĉe la maldekstra flanko de la enirejo de grandega parko apud vojo kondukanta al rivero Jangce. Li estas emeritulo, simile kiel mi, antaŭe li estis la direktoro de unu el la institutoj de Wuhana Teknika Universitato. Li parolis esperante bonege kaj tial ni bone komprenis unu la alian en kelkaj momentoj. Ni ĉirkaŭpromenis la malpli grandan lagon kaj foje-foje eksidis aŭskulti la porokazajn prezentojn de muzikistoj kaj kantistoj.

Tiu fenomeno estis tute disvastigita en Wuhan, en vesperoj preskaŭ en ĉiu stratangulo amatoraj muzikistoj muzikis al la preterpasantoj. Inter ili multaj ekdancis aŭdinte la orientajn melodiojn. Tagmeze Ding Ĵi invitis min por tagmanĝi kun siaj familianoj, kiuj loĝis en la kvara etaĝo de moderna domo apud la rivero Jangce. La venontan tagon ni iris al la memormuzeo de wuhana ribelo, kie mi rakontis paralelajn eventojn de la hungara historio.





La statuo de D-ro Sun Yat Sen, la unua prezidento de Ĉinio en urbo Wuhan, proksime al la Jangce rivero

La ribelo en Ĉinio okazis kontraŭ la manĝu imperiestra kortego, kiu donis privilegiojn al la eŭropaj investantoj en la ĉina ekonomia vivo. Laŭ la dekretoj de la imperiestro ĉiuj gravaj entreprenoj kiel ekzemple la fervojo devus aparteni al eŭropaj ekonomiaj potencoj kaj investuloj. Tiam kontraŭ tio ekis tutlanda protesta movado kiu fine kondukis al la neniigo de la imperiestra reĝimo.

En Hungario male, post la reĝimŝanĝo, do post la falo de la komunisma sistemo sukcesis la eksterlandaj investantoj akiri tiujn privilegiojn. La rezulto estis malĝoja: tutaj industriaj branĉoj falis en la manojn de eksterlandanoj. Ekzemple antaŭ la politikaj ŝanĝoj en la jaro 1990 dekdu sukerfabrikoj funkciis en Hungario. Ili kovris la enlandan bezonon, eĉ povis ankaŭ eksporti signifan kvanton. Baldaŭ ĉiuj sukerfabrikoj estis venditaj kaj la eksterlandaj posedantoj fermis unu post la alia. Sekve de tio hodiaŭ nur unu sukerfabriko restas en la lando kaj ankaŭ ĝi estas posedata de eksterlandanoj. Nuntempe la lando bezonas importi sukerojn kaj la antaŭaj hungaraj sukerbetoproduktantoj, transportantoj kaj prilaborantoj de agrikulturaj kaj industriaj entreprenoj perdis ilajn laborlokojn, multaj el ili apenaŭ vivetas per senlaborhelpa mono.

Kaj okazis same al la plantolea industruo kaj aliaj industrioj. Simile malbonŝance finiĝis ankaŭ la koncesia kontrakto inter la hungara ŝtato kaj eksterlanda investa grupo por konstrui aŭtovojon. Granda parto de tiu aŭtovojo estis jam konstruita per la mono de la hungaraj impostopagintoj antaŭ tiu koncesia kontrakto. Granda skandalo estis, kiam poste malkovriĝis, ke la sekrete subskribita kontrakto estis tute senriska por la eksterlanda investanto. Ĉar laŭ la kontrakto la hungara ŝtato garantiis gajni profiton al la alilanda investulo ankaŭ en la kazo, se la enspezo estus malpli alta, ol la kostoj.

Post tio la investintoj altigis la prezon de la aŭtovojoj tiom forte, ke la plejmulto de aŭtistoj ne uzis la aŭtovojojn. Tial la apudaj malĉefaj vojoj fariĝis neelteneble plenŝtopitaj kaj la vivkondiĉoj en tiuj vilaĝoj fariĝis netolereblaj. Samtempe la mono fluis for de la lando, ĉar la ŝtato konstante kompletigis la enspezojn de la investintoj, por ke ili ĉiam havu profiton. Vidinte la neelteneblan situacion la ŝtato fine

reaĉetis la koncesian rajton. Sed laŭ la kontrakto la ŝtato devis kompensi la eksterlandajn investintojn per dekjara, aŭ dudekjara (aŭ eĉ pli multjara) garantiita profito. Ĉinoj ne permesis doni tiajn privilegiojn al la alilandaj investuloj komence de la dudeka carcento kaj la tempo montris, ke ili estis pli saĝaj, ol ni en Orienta Eŭropo dum la reĝimŝanĝoj.

En la ventontaj tagoj Xiong Zhouan (Vera) kaj Luo Hancheng (Arhato) gvidis min tra la urbo. Kun Vera ni vizitis belegan vilao-kvartalon kaj luksan loĝejoparkon kaj kun Arhato ni iris al la plej granda budhista monaĥejo en Wuhan. Tio estas la fama Guiyuan Si preĝejo. En tiu vizito ankaŭ Trigo aliĝis al ni kaj ni kune admiris la belegajn monaĥejajn konstruaĵojn, kiel oazojn meze de la dekmiliona grandurbo. En la korto de la monaĥejo estas grandega Budho-skulptaĵo kaj plurcent homfiguraj vivgrandaj Budho-statuo troveblas en la templo, kiuj estas kovritaj per oro.

En la monaĥejo ni renkontis kelkajn profunde preĝantajn kaj ceremonie kliniĝantajn homojn, tamen ŝajnis al mi, ke tiu loko estis iom komerceca. Tio estis videbla jam tuj ĉe la enirejo, ĉar eblis eniri nur post aĉeto de dekjuana enirbileto. Estis tie ankaŭ granda sonorilo antaŭ unu el la domoj, kiun eblis sonigi per granda ligna horizontala bastono laŭ orienta kutimo. Por sonigi la sonorilon oni devis aĉeti kroman kvinjuanan bileton por tri tintoj, se mi bone memoras.

Krom tio estis ankaŭ butiko, kie almenaŭ dudek junulinoj vendis memoraĵojn por hororaj prezoj. Kelkaj religiaj memoraĵoj (aŭ eble nur turist-kiĉ-artaĵoj) kostis pli, ol mil dolaroj. Ni kunligis la viziton kun agrabla tagmanĝo en unu de la restoracioj de la monaĥejo, ni manĝis verajn vegetarajn budhistajn pladojn. Kelkaj manĝoj aspektis esti viandaĵoj, ekzemple bongusta manĝaĵo estis kaj forme kaj guste tute simila al rostita fiŝo. Sed mi eksciis, ke ĝi estis farita el sojofabo.

Ravite de la multaj vidindaĵoj mi iris hejmen kaj rimarkis strangan grupiĝon kun surdige laŭta strata muziko. Mi eksciis, ke okazis inaŭguro de nova superbazaro kaj okaze de tio oni volis allogi kiel eble plej multajn homojn per laŭta muziko kaj amaso da rabato. Al mi ĉefe estis surprize, ke sonis iaj orient-eŭropaj kantoj en stilo de

"Best of Communism" el la laŭtparoliloj. Irinte pli proksimen mi trovis, ke vere temis pri tio, la kantoj temis pro prezidento Mao.

Mi jam aŭdis antaŭe, ke dum la periodo de Mao oni povis aŭdi ĉiutage tiujn kantojn en la radio kaj multaj kutimis danci aŭskultinte tiujn kantojn. Tiutempe estis ĝenerala kutimo en Ĉinio matene antaŭ la bildo de Mao peti liajn instrukciojn kaj vespere oni devis raporti pri la farita laboro. Sed nun jam oni aŭskultis la konatajn kantojn nur por rememori la pasintajn tempojn. Ĉefe maljunuloj ĉeestis la ceremonion, la plejmulto de la junuloj eble eĉ ne sciis, en kiuj cirkonstancoj vivis iliaj gepatroj, kiam tiujn kantojn estis devige aŭskulti ĉiutage en la radioj.

En la pasintaj semajnoj mi rimarkis kun surprizo, ke ĉinoj ne komprenis aŭ malbone interpretis la titolon de mia libro pri mia japana studenta vivo. La titolo estas "Ruĝa suno kaj verda stelo". Laŭ mi estis facile komprenebla, ke la titolo rilatis al Japanio. Ĉar Japanio estas nomata en multaj eŭropaj landoj kiel la "Lando de Leviĝanta Suno" kaj la ruĝa suno estas ankaŭ mem sur la japana flago. Nur nun mi komprenis, ke por ĉinoj la ruĝa suno signifis prezidenton Mao, ĉar laŭ la teksto de la kanto tiu epiteto rilatis klare al la estinta prezidento, laŭ kies fama diraĵo la orienta vento iam venkos la okcedantan venton.





Tradicia ĉina pordego kaj la aŭtoro





Ĉinaj stratopartoj





Malnovaj loĝejoj kaj oraj Budho-statuoj





Tradiciaj ĉinaj domoj kaj ĉinoj en la iama koncesia zono





Bongustaj ĉinaj mangaĵoj



TRI KONDIĈOJ DE LA FELIĈA VIVO

Kiam mi studis en japana universitato antaŭ tridek jaroj, tiam en la fora pacifika insularo estis vaste konata fama popola diraĵo pri tri kondiĉoj de la feliĉa vivo. Ili estas la jenaj: japana edzino, ĉina kuiristo kaj usona kuireja tekniko. Tiuj kondiĉoj aludis al la venontaj spertoj: la japanaj virinoj estas bone edukitaj kaj tradicie ege helpemaj, obeemaj, empatiaj kaj zorgemaj. La ĉinaj manĝaĵoj estas la plej bongustaj en la regiono. La modernaj usonaj kuirejaj aparatoj kaj maŝinoj efike plifaciligas la hejman laboron en la kuirejo.

Sed en mia nuna azia vojaĝo mi spertis, ke la situacio estas iom pli nuancita. Mi povis sperti, ke ankaŭ la ĉinaj virinoj estas tre helpemaj kaj kelkfoje perforte tro afablaj. Kiel sciite: kaj en Ĉinio kaj en Koreio laŭ tradicio la gasto devas esti provizata per ĉio ebla kaj tiu pensmaniero estas apenaŭ komprenebla per eŭropa homo. Ĉinoj kaj koreoj vivintaj dum signifa tempo eksterlande komprenas la alian eŭropan pensmanieron, sed la ordinaraj homoj ne tute. Mi pensis, ke estis normala afero, ke miajn kostojn mi mem pagu, sed pro la alia orientazia pensmaniero ĉinoj plejofte ne volis lasi min pagi.

Ĉina instruistino el Wuhan donis al mi interesan sperton pri tiu afabla gastama ĉina konduto, kiun mi ekkonis antaŭ tri tagoj en lingva klubo. Ŝi volis ĉiam afabli al mi, sed la rezulto estis tre ofte miskomprenoj, kiam ni iris kune ien ajn. La miskomprenoj komenciĝis jam kiam ni enbusiĝis, ĉar tiam ŝi kutime alvokis la vojaĝantojn ekstari kaj transdoni al mi siajn sidlokojn. Mi sukcesis apenaŭ residigi ĉiujn al sia loko klariginte al ili, ke en Eŭropo ĉefe estus la tasko de viroj transdoni siajn sidlokojn al la virinoj.

Kiam mi volis doni mian vojaĝkoston al la ŝoforo, unu juanon, la virino mansignis, ke ŝi jam pagis ĝin. Kiam mi volis doni la monon al ŝi, tiam ŝi ne volis akcepti ĝin. Mi donis ĝin kvinfoje al ŝi kaj ŝi redonis ĝin kvinfoje.

Post kvaronhoro multaj vojaĝantoj eliris el la buso kaj tiel estiĝis multaj liberaj sidlokoj. Tiam mi eksidis kaj subite mi mallaŭte ternis pro enspiro de polvo. Tiam la virino tuj kuris al la klimatizilo kaj

komencis turnadi ĝin en alia direkto por blovi la malvarman aeron en alian direkton. Ŝi supozis, ke mi certe malsaniĝis kaj ternis pro tio.

Jam pli frue dum babilo mi hazarde menciis, ke por mi estis nekutimaj la loĝejoj en grandaj, 20-30 etaĝaj modernaj konstruaĵoj, kiuj troviĝis en multaj partoj de Wuhan. Mi komprenis, ke tiuj estis bezonataj en la dekmiliona grandurbo, sed en mia juneco mi alkutimiĝis al trankvila vivo en silentaj, vilaĝecaj, ĝardenaj domoj. Se mi sciintus ke mia nepripensita klaĉo kaŭzos seriozajn sekvojn, mi tute ne parolintus sincere pri miaj pensoj.

Ĉar la virino decidis, se tio plaĉas al mi, tiam ŝi gvidos min al tiutipa kvartalo. Ni veturis dum pluraj horoj ŝanĝante aŭtobusojn kaj tiel mi havis eblon kompari la ĉinan bustrafikon kun la vjetnama. Ĉi tie en Ĉinio la busoj kursas multe pli regule, ol en Vjetnamio. En urbo Wuhan la busŝoforoj klopodas teni la horaron kaj haltas nur en la indikitaj haltejoj. Ĉi tie estis nekonate la vjetnama kutimo, kiun mi spertis dum mia vojaĝo inter Ha Noi kaj Nanning. Tie okazis, ke kiam la ŝoforo ekvidis kamparanon venditan belan frukton apud la strato, tiam li haltigis la buson, eliris ankaŭ kun la konduktoro kaj ili aĉetis freŝajn fruktojn. Dum tiu tempo la vojaĝantoj silente sidis en la aŭtobuso.



Veturinte buse ni jam delonge forlasis Wuhanon, kiam ni alvenis al luksa loĝejparko en apudlaga vilaokvartalo. Mi supozis, ke tie loĝis sopozeble riĉegaj ĉinoj kaj altrangaj urbaj oficistoj. La tereno estis ĉirkaŭita per pikdratoj kaj armita gardistaro zorgis pri defendo kontraŭ nekoncernuloj. La virino iris al la ĉefo de la gardistoj kaj konvinkis lin, ke li nun malfermu la pordon ankaŭ por ni, kvankam ni ne havis specialan ĉipan enirkarton.

Enirinte la zonon la virino ekpensis, ke mi certe malsatis kaj proponis, ke ni iru en restoracion kie ŝi mendos tagmanĝon. Kiam mi diris, ke mi ne estis malsata, tiam ŝi iris en vendejon por aĉeti almenaŭ sandviĉon. Kiam mi diris, ke nek tion mi ŝatus, tiam ŝi elpensis, ke tiukaze mi manĝu almenaŭ iun frukton, ktp, ktp. Fine mi jam komencis perdi mian paciencon kaj iom embarasite diris al ŝi, ke mi estis nek malsata, nek soifa kaj mi volis havi nek kekson, nek vaflon, nek kolbasetojn, nek akvon, nek kolaon, nek ion ajn.



El tio ŝi konkludis, ke mi certe estis laca iomete. Pro tio ŝi diris al mi, ke, estis nenia problemo, ĉar estis en la proksimo moderna ripozcentro en la vilaokvartalo kun naĝejo kaj kun kuŝfoteloj. Ŝi parolis kun la pordistoj de la naĝejo, kaj petis, ke ili permesu nin eniri, kion ili fine konsentis. Ni iris plu sur vojo rande de la vilaokvartalo, sed la virino vidis, ke mi iris tro proksime al la drata barilo kaj ŝi timis, ke eble mi vundos min per la dratoj. Tial ŝi petis, ke mi iom malproksimiĝu de la barilo kaj ŝi decidis promeni inter mi kaj la barilo por preventi, ke mi hazarde tuŝu la barilon kaj vundu mian korpon.

En la naĝejo estis tro modernaj iloj nerimarkeblaj por mi, ekzemple la duŝoj funkciis per fotoĉeloj. Proksimiĝante al unu el la duŝoj, ĝi ekfunkciis aŭtomate kaj malsekigis iomete mian to-ĉemizon. Pro tio la virino ektimis kaj demandis min: kio nun okazos. Mi respondis: nenio grava, ĉar en la 38 °C grada varmeco ĝi sekiĝos en kelkaj minutoj. Sed ŝi ĉiukaze volis iri en vendejon por aĉeti novan ĉemizon por mi. Mi apenaŭ sukcesis konvinki ŝin, ke ŝi ne faru tion. Sed kiam mi fine sukcesis konvinki ŝin, tiam ŝi rekomencis proponi denove, ke mi manĝu sandviĉon, aŭ kekson aŭ almenaŭ frukton, ktp.



Vesperiĝinte mi diris, ke mi jam devus reiri al mia hotelo. Reveninte ni veturis per klimatizita buso, do la tubon de la klimatizilo nun oni ne devis turnigadi. Sed videble nek tio estis bona, ĉar la virino komencis denove malpacienti. Ĉar ŝi pensis, ke nun eble estis tro varme por mi, tial ŝi komencis malfermi la apudan fenestron por havi pli da aero.

Post plurhora busveturo ni revenis al mia hotelo. Tiam mi diris al la virino, ke mi nun ne iros en la hotelon, sed manĝos en la apuda domo akrespican buljonon. Tiam denove komenciĝis la kutima ĝentilumado, ĉar ŝi volis pagi tion. Sed nun mi estis pli atentema, ĉar kiam ŝi ne atentis, tiam mi donis la monon al la gastejisto. La virino poste ankoraŭ longe parolis kun la gastejistoj kaj foriris hejmen. Fininte la vespermanĝon mi ekiris al la strato, kiam la kuiristino haste alkuris al mi por montri al kiu direkto mi ekiru al mia hotelo.

La kaŭzo estis, ke mia partnerino antaŭ hejmeniro petis ŝin montri al mi la vojon post la vespermanĝo, por ke mi ne erare elektu la vojon en la nekonata urbo. Por kompreni la situacion estas bezonate scii, ke la restoracio estis tuj en la apuda domo de mia hotelo, inter la du pordoj estis eble 30 metra distanco kaj kutime mi promenis ĉiutage dekfoje antaŭ la pordo de tiu restoracio. (Fakte ĉiam, kiam mi eliris el la hotelo.) Mi apenaŭ sukcesis kvietigi la kuiristinon, klarigante, ke mi ne perdos la vojon. La kompatinda kuiristino sen ajna fremd ligvokono provis gestadi por montri, al kiu direkto mi iru al mia hotelo de la restoracio. Ŝi faris tion tre entuziasme, ĉar ŝi timis, ke se mi turnus min en la inversan direkton, tiam mi neniam trovus la enirejon de mia hotelo.



REVENO AL EŬROPO

Ĉar pasis jam preskaŭ kvar semajnoj dum mi vagadis en Sud-Orient-Azio kaj en la mezaj regionoj de Ĉinio, mi sciis, ke proksimiĝis la tempo por revojaĝi al Eŭropo. Mi kalkulis, ke mi plenumis kaj plenumos proksimume dudek kilometrojn ĝis mia revojaĝo, kiu estas distanco egala al pli-malpli duona ekvatoro. Dum la vojaĝo konvene al la lokaj cirkonstancoj mi parolis foje angle, foje japane, eventuale ankaŭ ruse aŭ Esperante. Sed okazis, ke mia prononcmansiero estis definitive nekomprenebla kaj tiam mi ĉine skribis la plej gravajn vortojn sur paperpeceto.

La raportoj pri mia vojaĝo aperis ankaŭ eksterlande. El pluraj lokoj venis pretendoj, ke la raportaĵaron estus bone eldoni ankaŭ libroforme. En Japanio oni kompletigis mian verkon, aldonante, ke la kantojn glorigantajn prezidenton Mao - kiel tion mi menciis en la antaŭaj ĉapitroj - volonte kantis eĉ grupo de japanaj gestudentoj. Inter ili ankaŭ la kanto “東方紅” (Dong fang hong “Ruĝas la oriento”), kiun en la periodo de ĉina kultura revolucio oni povis ofte aŭdi eĉ en Japanio en la origina ĉina lingvo. Japana traduko de la tiam tre populara kanto ne aperis eble eĉ ĝis nun.



Multaj kelnerinoj servas en eleganta restoracio

Mao Ze Dong estas nomita en la kantoj survenanta suno orienta, do ruĝe ardanta matena suno. Samtempe aliloke la iama prezidento estas nomita ankaŭ "rénmín dà jiù xīng!" 人民, kiu signifas ankaŭ "stelego savanta la popolon". Kvankam la kanto estis prezentita en origina ĉina lingvo tra Japanio, tamen la tekstoj skribitaj per ĉinaj grafemoj ne estis uzataj tie, ĉar la ĉina ortografio, simpligita post la milito, ne estis transprenita de la japanoj. La preciza teksto de la kanto, per grafemoj uzataj ankaŭ en Japanio, estis la jena:

东方红，太阳升，東方紅、太陽昇、
中国出了个毛泽东。 中国出了個毛沢東。
他为人民谋幸福， 他為人民謀幸福、
呼儿咳呀，他是人民大救星。
(呼兒咳呀)、他是人民大救星。

Tiu sama teksto per la pinĵina skribsistemo uzata en Ĉinio:

*“Dōngfāng hóng, tàiyáng shēng,
Zhōngguó chū liao ge Máo Zédōng,
Tā wèi rénmin móu xìngfú,
Hū ěr hei yo, tā shì rénmin dà jiù xīng!”*

La Esperanto traduko de la kanto:

*“Ruĝas oriento, leviĝas suno,
en Ĉinio aperis Mao Zedong,
li strebas feliĉiĝi la popolon,
li estas savanto de la popolo”.*

En la tagoj antaŭ mia revojaĝo al Eŭropo mi havis la eblon renkontiĝi kun profesoro Zhang Danchen (Danko), kiu instruis rusan lingvon kaj Esperanton en la universitato de Wuhan. La profesoro laŭ ĝeneralaj ĉinaj kutimoj loĝis kun sia edzino en la kampuso. Li demandis min, ĉu mi vespermanĝus kun ili en la restoracio de la universitato. Sed mi tiom satiĝis tagmeze ĉe alia gastiganto, ke mi malkapablis preni eĉ vespermanĝon tiutage. Tial ĝentile mi forigis la

inviton kune vespermanĝi. Anstataŭe mi eluzis la eksterordinaran eblon, kaj mi trarigardis la faman libraron de la profesoro, kaj detale informiĝis pri la stato de la lingvoinstruado en Ĉinio.

Ĉar la prezoj estis sufiĉe malaltaj en Ĉinio, aliflanke ĉar miaj ĉiutagaj bonaj kontaktoj kun la lokuloj ebligis trovi la plej malmultekostan veturmanieron, mi povis ŝpari multe da mono. Krome, pro la preskaŭ kontinuaj invitoj al tag- kaj vespermanĝoj, mi povis apenaŭ elspezi monon ankaŭ por la manĝoj. Pro tio pli ol duono de mia kunportita mono restis netuŝita. Tamen tiun monon mi ne devis reŝanĝi, ĉar Peng Zhengming iniciatis, ke mi faru prelegserion ankaŭ en sudĉina Hajnan insulo. Laŭ lia propono iom vastigante mian prelegon en Hanojo en la Internacia Kongresa Universitato, mi povus organizi novan univesitatan kurson ankaŭ pri la tutglobaj problemoj. Tiutipaj problemoj estas la mediopolucio, la ekonomiaj krizoj, la malekvilibroj en la evoluo, ktp. Post analizo de la problemoj estus ankaŭ utila trarigardi la agadeblecojn de la organizaĵoj estigitaj por kontroli la procezojn kaj por manipuli la problemojn. Tiutipaj organizaĵoj en nia epoko estas la UN kaj la Plej Superaj Aŭditoraj Organizaĵoj por Kontroli la Ŝtatpotencojn. Se la gvidantaro de la universitato akceptos tion, tiam estos imageble, ke post kelkaj monatoj mi revojaĝos por prelegi al la Hajnan insulo en Sud-Ĉinio.

Miaj gekonatoj en urbo Wuhan aranĝis grandan bankedon inter la 2-a kaj 5-a ĥoroj en la posttgamezo de mia forvojaĝo, en la restoracio de la fervoja kompanio, kaj poste ili akompanis min perpiede al la busa stacidomo. Pro la deviga komplezemo de la ĉinaj homoj la virinoj en la societo senĉese volis elpreni mian valizon el miaj manoj, por ke ili ruligu ĝin apud mi sur la vojo.

El urbo Wuhan, la metropolo sur la bordoj de Jangce rivero revojaĝante tra Ŝanhajo kaj Moskvo, mi reflugis al Budapeŝto. En Ŝanhajo kaŭzis malgrandan problemon, ke en la Ŝanhaja flughaveno oni devis iri al la aviadiloj ne laŭ la informoj, kiuj estis skribitaj sur la muroj. Aldone, pro la tropleno de la flugspaco mia aviadilo ekis pli malfrue ol la fiksita ekveturtempo en la horaro.

Pro tiu ĉi malfrua ekfluo ni malfrue alvenis al Moskvo kaj tie mi malfruis mian venontan aviadilon por pluvojaĝi al Budapeŝto. Ja post

sufiĉe longdaŭra, plurhora tien-reensendado la flugkompanio finfine certigis al mi senpagan hotelĉambbron en Moskvo kun varmaj vespermanĝo kaj matenmanĝo. Kaj kompreneble mi ricevis senpage novan bileton al la aviadilo al Budapeŝto en la sekva mateno. Tiel la 20-an de aŭgusto, en la tago de la ŝtata festo de Hungario mi bonŝance alvenis hejmen el la Fora Azio.

Jene ni venis al la fino de mia raportoserio pri mia vojaĝo tra Sudorient-Azio. Origine mi dediĉis tiun ĉi raportajaron al la membroj de la interreta listo de Hungaria Esperanto-Asocio. Poste mi aŭdis, ke ekestis granda interesiĝo pri la verkoj, multaj homoj atendis senpacience la aperon de la novaj partoj. En la Tutlanda Fremdlingva Biblioteko Nemes Anikó, manaĝerino de la Fajszy Kolektaĵo, deklarite protektita pere de la Kultura Ministerio ofertis, ke pro la granda interesiĝo pri la skribaĵoj la serion oni metis sur sian interretan paĝon Kávészünet ('Kafpauzo'). Krom tio mi aŭdis el aliaj fontoj, ke partojn de la skribaĵoj oni metis ankaŭ en aliajn interretajn forumojn. La celo estis, ke gelernantoj de fremdaj lingvoj aŭ interesiĝantoj pri la Azia situacio ankaŭ ĉi-kanale akiru la informojn donitajn en la serio.



La aŭtoro kaj profesoro Zhang Danchen kun edzino

En la hungara esperantista komunumo pluraj eminentaj verkistoj, sciencistoj, politikistoj kaj instruistoj kontribuis al la disvastigo de la internacia lingvo kaj ĝia movado dum la pli ol centjara movada historio. Unu el la pli fruaj prezidantoj de la Hungaria Tutlanda Esperanto-Asocio estis Karinthy Frigyes, la senmorta verkisto. Unu el la gvidantoj de la ĵuspasinto estis Haszpra Ottó, kiu mortis antaŭ kelkaj semajnoj. Li estis katedrestra profesoro de la Budapeŝta Teknika Universitato, kiun elektis sia membro ankaŭ la Akademio de Esperanto krom aliaj sciencaj akademioj.

Por la membroj de tiu ĉi pli ol centjara komunumo tiu ĉi raportaĵaro donas pli da informo, ol por la kutimaj legantoj. Estas tiel, ĉar ili tre ofte konas persone la homojn en la priskriboj kaj ankaŭ la fonon de la priskribitaj eventoj. Sed ekkoni la ĉiutagan vivon de aziaj popoloj vivantaj plurmil kilometrojn for de Eŭropo estas interese ankaŭ por la aliaj legantoj. Legante la libron ili povas sperti ankaŭ en la praktiko, kiajn malfacilaĵojn povas havi la organizado de tia ekzotika vojaĝo sen kono de fremdaj lingvoj.

La legado de ĉi-tiu libro povas kuraĝigi la legantojn por ke ankaŭ ili ellernu iun el la grandaj mondlingvoj almeaŭ baznivele. Kaj la legado povas alvoki la atenton ankaŭ pri tio, ke krom la lingvoj de Eŭropo, povas esti utile konatiĝi ankaŭ kun la aziaj lingvoj iomete. Ja pere de tio oni povas havi unikan alrigardon al la vivo de multaj popoloj kun plurmiljara kulturo, kio estas por ni iom ekzotika. Krome, tiu ĉi raportaĵaro pri Sudorient-Azio povas alfokusigi la atenton, ke en la praktiko ofte oni povas uzi Esperanton, la plej facile alproprigeblan lingvon de la mondo kun multe pli granda rezulto, ol iun ajn mondlingvon.

Ja tiu ĉi komunumo, parolanta la komunan lingvon, komence de la 21-a jarcento estas trovebla ne nur en ĉiuj landoj de Eŭropo, sed krom Nord- kaj Sud-Ameriko, Afriko kaj Aŭstralio ankaŭ en Azio. Nuntempe jam esperantistoj troviĝas eĉ en la preskaŭ hermetike fermitaj aziaj regionoj apenaŭ vizitataj de eksterlandanoj, kiujn mi trapasis dum mia nuna vojaĝo. La membroj de tiu ĉi komunumo estas gastamaj kaj malfermitaj al la ekstera mondo. Kiel membroj de

mondvasta lingva klubo, eluzante la eblojn komuniki pere de la komuna lingvo, ili renkontas kun ĝojo la alvenintajn eksterlandanojn.

En tiu ĉi mondskala klubreto ne ekzistas membrokotizo. Pli precize la membrokotizo estas, ke oni devas ellerni tiun komunan lingvon per du aŭ trimonata laboro. Farante tion la homoj facile povas paroli en tiu ĉi lingvo almenaŭ baznivele. Eble ankaŭ la tralego de la nuna libroserio helpas la legantojn rekoni tiun ĉi ekstreme favoran eblon, kaj ĝi povos kontribui al la nuligo de la totala nekomprenemo kontraŭ la etika forto de la internacia Esperante parolanta komunumo.



Peng Zhengming (Trigo) en wuhana strato

ENHAVO

| | |
|---|-----|
| Antaŭparolo | 6 |
| Enkonduko | 8 |
| 1. Alveno al Vjetnamio | 10 |
| 2. Vojaĝimpresoj pri Hanojo | 17 |
| 3. Universala Kongreso de Esperanto | 28 |
| 4. La griza papago | 32 |
| 5. Vojaĝeblecoj al la Sankta Lando | 34 |
| 6. Komplikaĵoj pri ŝtrumpoaĉeto | 40 |
| 7. Oĉjo János en la Osaka mondekspozicio | 46 |
| 8. Studentoj ĉe la lago Hoan Kiem | 50 |
| 9. Rostitaj hundaĵoj en bazaro de Hanojo | 55 |
| 10. Diskuto pri komunismo en luksa hotelo | 61 |
| 11. Matenmanĝo ĉe bazaro Phung Hung | 67 |
| 12. En la urbo de Suda Trankvilo | 72 |
| 13. Miaj neĉiutagaj problemoj en Nanning | 83 |
| 14. Sur la vojoj de Interna Azio | 90 |
| 15. Sur la bordo de la Longa rivero | 98 |
| 16. Lotus-arbaro ĉe la Orienta lago | 106 |
| 17. Tri kondiĉoj de la feliĉa vivo | 117 |
| 18. Reveno al Eŭropo | 122 |